

1980 decembro

73-a jaro


n-ro 900 (12)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Brazilio estos
la movada ĉefurbo por 1981

Vi trovos,

post kelkaj monatoj, kiam ni publikigos la koncernajn statistikaĵojn, ke la abonantaro de ĉi tiu revuo konsiderinde kreskis dum la jaro, kies provizora punkto estas ĉi tiu revunumero. Bela novaĵo, ĉu ne? Dankon pro tiu subteno! Dankon, ke vi tiamaniere pardonas niajn baraktetojn pri la akurateco dum la lastaj monatoj. Jes, ni scias, kion vi volas diri pri tio kaj vi, ne cetere, sed certe pravas — plene. Vi trovos ankaŭ ke jaro baldaŭ finiĝos aŭ ĵus translokiĝis al la historio — por ĉiuj, krom por la kompatindaj librotentistoj, kiuj ankoraŭ devos multe ŝviti antaŭ ol saldi 1980. Ne pensu, ke tio ne okazas ĉe UEA! Vi trovos, ke eĉ sen nia anonco tiurilata baldaŭ komenciĝos aŭ ĵus ekruliĝis la nova 365-taga fasko, kiu nomiĝas 1981. Se tiu ĉi numero atingos vin nur meze de januaro, havu feliĉon en la restontaj 350 tagoj de 1981! Ĉu tio sufiĉas? Fakte, ni neniam sukcesis kompreni, kial la homoj tiel rapidegas por bondeziri la novan jaron fine de decembro. Kvazaŭ oni sen tiuj bondeziroj vere ne povus travivi eĉ nur la komencajn semajnojn de januaro. Ni konas homon, kiu dissendas siajn novjarajn bondezirojn nur komence de februaro. Tio malkontribuas al la poŝta paneo en decembro, kaj tiuj februaraj bondeziroj ricevas plenan atenton, anstataŭ simple perdiĝi en la decembra lavango de la buntaj salutkartoj, kiujn tiel ofte sendas al vi la homoj, kiuj tra la jaro neniam memoras vin. Ni ja estas io alia, ĉar ni salutas vin 11-foje jare.

Enhavo

- 201 Okaze de la Zamenhofa Tago: Eldona monumento por Zamenhof (Boris Kolker)
- 202 66a Universala Kongreso: Malmultekoste loĝi
- 203 Brazilio, urbo de la 66a Universala Kongreso de Esperanto: Triumfo de la homa kreopovo (Roberto Passos Nogueira)
- 206 Dum la Ĝenerala Konferenco de Unesko: Eta referendumo pri Esperanto (Tibor Sekelj)
Blinduloj: Sociologia esploro pri Itala Asocio de Blindaj Esperantistoj
- 208 Faka agado: Kibernetikistoj por Esperanto; Japanio: Viroj sklavas al "laboreja familio"; Rumanio: Fondiĝis junulara sekcio
- 209 Recenzoj: "Skizo de ŝuahila metriko" de Nino Vessela (L. Knoedt); "En senvoja sovaĝejo" de Jacob Maris / R. de Jong (W. Krikke); "Apostolo de libereco. . ." de M. MacDermott / N. Aleksiev (Detlev Blanke); "Analizo de la interrilatoj inter la blindularo. . ." de José Starck (W.A.M. van Heugten); "Marfilo Karlo" de Jean Bomford (F. Gruic); "La kalva kantistino" de E. Ionesco / G. Lagrange (M. Nervi)
- 211 Laste aperis . . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 212 TEJO-paĝo: Koreo: Junaj kaj izolitaj (S. MacGill); 37a Internacia Junulara Kongreso: Fine, la kotizoj!
- 213 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 215 Ekzameno E (Bernard Golden); Oficiala informilo
- 216 Indekso de la jarkolekto 73 de la revuo "Esperanto"
- 219 Anoncoj kaj anoncetoj
- 220 Esperanto en radio (kompleta tabelo)

La kovrilo

"Itamarati" estas la nomo de la palaco sur la kovrilo. Ĝi estas pli svelta kaj iel strange diafana, ol eblas konstati sur la foto. Ĝi kvazaŭ flosas sur sia akva spegulo. Multaj konsideras Itamarati la plej bela konstruaĵo de la brazila ĉefurbo. Ni dubu pri tio, ĉar Brazilio havas ankaŭ sian katedralon, kie la betono montras nekredeblan petolemon. Estas tie ankaŭ la papera subtileco de la palaco Alvorada kaj la impona sidejo de la brazila Parlamento, kun tiuj du grandegaj "teleroj" en kiuj kunsidas la deputitoj kaj la senatanoj. La preĝejo Dom Bosco en sia simpla vitra skatolo entenas la tutan ĉielbluon de la brazila Altebenaĵo. La kongresejo mem de la 66a UK estas konstruata ĉefverko.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). Legantoj en 91 landoj.

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo por unu kalendara jaro: 33,00 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 55,— gld). Unuopa ekz. 3,— gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1000, 1/2 p. 530, 1/4 p. 290, 1/8 p. 170, 1/16 p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri financo kaj administrado: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Vicprezidanto kaj estrarano pri landa kaj regiona agado: d-ro Renato Corsetti, Via Strabone 1, I-00176 Roma, Italio; tel. (06) 29 26 07.

Vicprezidanto kaj estrarano pri kulturo: s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando; tel. (91) 3 73 01.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri planado: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII.22., H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23-274.

Estrarano pri informado kaj delegita reto: s-ino Ursula Grattapaglia, C.P. 04-0097, BR-70000 Brasília (DF), Brazilo.

Estrarano pri kongresoj kaj virina agado: s-ino Eliza Kehlet, Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio; tel. (031) 51 46 36.

Estrarano pri faka agado: s-ro Petăr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario.

Estrarano pri esploroj, edukado kaj kunordigo de eksteraj rilatoj: prof. Humphrey Tonkin, Stouffer College House, 3700 Spruce St., Philadelphia, PA 19104, Usono; tel. (215) 382-5874.

Eldona monumento por Zamenhof

Nur maturaj lingvoj kaj kulturoj zorgas pri la plena verkaro de siaj ĉefkontribuintoj. La fakto, ke la Internacia Lingvo nun akiras sian unuan tiaspecan librokolekton estas plia signo de la matureco de la Esperanta kulturo. Sesdekon da jaroj post la fizika kompletigo de la verko de Zamenhof, anonima japana eldonisto, per siaj privataj rimedoj kaj personaj fortostreĉoj, tra la lasta jardeko konstruas la plej imponan monumenton al la aŭtoro de Esperanto, en la formo de plena verkaro de L.L. Zamenhof. Anstataŭ recenzi la laste aperintajn kvar volumojn de tiu kolekto, Boris Kolker en la ĉi-suba teksto — prave — nur publike trinkas el la riĉega fonto de la zamenhofaj citaĵoj, kiuj, kiel vi mem konstatos, malgraŭ la aĝo perdis nenion el sia aktualeco.

ANTAŬ pli ol 20 jaroj, en la komenco de mia esperantisteco, mi supozis, ke mi kapablas kompreni nur lernolibrajn tekstojn. Ne sen antaŭtimo mi komencis legi kongresajn paroladojn de Zamenhof. Grandaj estis miaj miro kaj kontentiĝo, kiam mi malkovris, ke mi ĉion komprenas. Mi estis ravita de liaj ideoj, stilo kaj vervo, kiuj karakterizas la paroladojn. Sed, estante izolulo, mi iom post iom malvarmiĝis. En tiu por mi kriza momento, malnova esperantisto sendis al mi la



L.L. Zamenhof

Ĉinoj ame teksis belan silkan portreton de Zamenhof: Ĉu lia genieco havas pli da admirantoj en Azio ol en Eŭropo?

verkon de Zamenhof *Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia*. Kvankam verkita duonjarcenton antaŭ mia eklego, ĝi tiel forte impresis min, ke mian sorton mi por ĉiam ligis kun Esperanto.

Estas do kompreneble, ke, eksciinte pri la intenco de la anonima Ludovikito publikigi "iam kompletigotan plenan verkaron de L.L. Zamenhof", mi streĉis la fortojn por akiri ĉiun volumon de tiu plej aŭdaca eldona entrepreno en la Movado. Laŭ sia enhavo, prilaboro kaj luksega tipografia aranĝo la verkaro estas inda monumento al la aŭtoro de la Internacia Lingvo.

Kronologie la materialoj* distribuiĝas jene: la jaroj 1901-1904 (kajero 6), 1905-1906 (kajero 7), 1907-1908 (kajero 8). Ĉiu volumo enhavas detalan indekson. Bedaŭrinde, nur la kajero 6, same kiel la unuaj kvin, entenas riĉajn kaj spritajn komentojn de la eldonisto.

Estas mirinde, kiel multe Zamenhof sukcesis fari: okupiĝi pri unuopaj abonoj kaj libromendoj, respondi lingvajn kaj organizajn demandojn, zorgi pri kongresoj kaj libroeldonado, peni pacigi kverelemajn parizanojn, ellabori taktikon dum la Ido-krizo, krei bazajn dokumentojn, provi kaj rebati lingvajn reformojn, okupiĝi pri etikaj demandoj, persvadi, verki, traduki, redakti, havi penajn traktadojn kun la firmao Hachette kaj — intertempe — laboregi por nutri sian familion!

Anstataŭ rerakonti aŭ komenti ni prefere iru al la fontoj:

"Ĉiu, kiu konas min, scias, kiel malmulte Esperanto donas al mi en financaj rilatoj. Nun, kiam ekzistas centmiloj da esperantistoj, mi devas perlabori mian ĉiutagan panon per tio, ke en malriĉa kvartalo mi akceptadas malsanulojn de okulo kaj al la Esperanta afero nur devas dediĉi miajn restantajn liberajn horojn ĝis malfrua nokto." (kajero 8, p. 125)

"Antaŭhieraŭ mi revenis Varsovion kaj trovis tie ĉi grandegan amason da leteroj (pli ol 500)." (kajero 7, p. 377)

* Bibliografiajn detalojn kaj prezojn vidu ĉe la fino de ĉi tiu teksto.

Ni povas esti fieraj, ke la kreinto de nia lingvo estis homo nobla, modesta, disciplinema, pacema kaj pacigema, sed samtempe firma en principaj aferoj.

"La diversaj flataĵoj kaj la nomo 'majstro', kiun multaj uzas en siaj leteroj al mi, estas al mi tre malagrabla." (kajero 7, p. 12)

"Mi tre petas vin, akceptu en la programon de la kongreso nenian punkton, kiu havas ian rilaton al mia **persono**." (kajero 7, p. 44)

"Mi multe laboris por la afero Esperanta, sed tamen mi neniam permesis al mi ion **altrudi** al la esperantistoj; ĉiufoje, kiam miaj proponoj ne estis akceptitaj, mi obeeme retiriĝis kaj uzis neniajn artifikajn rimedojn por akceptigi mian volon." (kajero 8, p. 123)

"Vian opinion, ke mi 'ne bezonas konsilojn' mi trovas ne tute ĝusta: kontraŭe, mi tre bezonas konsilojn kaj ĉiujn konsilojn mi akceptas ĉiam kun sincera danko; sed, kompreneble, ricevante tre multe da diversaj kaj malsamaj konsiloj, mi ne povas blinde plenumi ĉiujn, sed mi devas ĉiujn esplori per mia propra cerbo kaj sperto kaj elekti tiun manieron de agado, kiun mi trovas la plej bona por nia afero." (kajero 8, p. 304)

Kiel sagaca estis Zamenhof koncerne la personecon de L. de Beaufront! Ankoraŭ en 1905 li skribis konfidencon al Bourlet: "... la fonto de ĉiuj maljustaj ofendoj ... estas s-ro **de Beaufront**." (kajero 7, p. 173)

"En la tempo de Esperanto la nomo de tiu mistera lingvo estas "Adjuvanto"; se nun estus en floro Vola-pük, s-ro B. certe dirus, ke lia lingvo havis la nomon "Adjuvük". Mi ne dubas ankaŭ pri la fiktiveco de la titolo de markizo, kiu aperis tute subite antaŭ du-tri jaroj; mi ne dubas ankaŭ pri la fiktiveco de la tuta biografio de s-ro de Beaufront." (kajero 8, p. 234)

Kiel ajn detektiveca ŝajnis tiu aserto, la historio ĝin

plene konfirmis (vidu: Tazio Carlevaro: "La enigmo de Beaufront", *Literatura foiro*, n-ro 37-38, julio-aŭgusto 1976).

La sociolingvistikaj konceptoj de Zamenhof kaj sciopovo defendi ilin ne nur en la pasinteco kelkfoje savis Esperanton, sed ili ne perdis la aktualecon ĝis nun:

"Simile al ĉiu alia lingvo, Esperanto devas esti rigardata kiel lingvo **finita** kaj **netuŝebla**. Paroli pri iaj plibonigoj (se ili estos efektive necesaj) ni povus nur tiam, kiam nia lingvo estos jam **oficiale akceptita** en la tuta mondo." (kajero 6, p. 115)

"Laŭ mia opinio, estus necese, ne ke mi verku teoriant detalan gramatikon, sed ke mi verku kiel eble pli da praktikaj libroj (diversaj literaturaj tradukoj); el **tiaj** miaj libroj ĉiu povus lerni la lingvon kun ĝia tuta vera kaj unuforma spirito multe pli bone, pli facile kaj pli precize, ol el la plej dika gramatiko." (kajero 6, p. 147-148)

"Laŭ mia opinio kaj deziro en Esperanto devas ekzisti ne persono leĝdonanta, sed nur ia unu fojon por ĉiam elektita **libro** leĝdonanta; ĉiuj miaj opinioj ne esprimittaj en la gramatiko kaj Universala Vortaro devas esti rigardataj ne kiel leĝoj, sed nur kiel **konsiloj de la plej kompetenta esperantisto**." (kajero 6, p. 174)

"... la forto, kiun donas al ni nia **konstanteco** kaj **persisteco**, estas multege pli granda ol tiu tre duba forto, kiun povas doni al ni la Delegacio." (kajero 8, p. 29)

Pri naturalismaj lingvoprojektoj: "Kiu volas nur fari **impreson** de domo, tiu povas fanfarone kolekti amason de netuŝitaj ŝtonoj; sed kiu volas konstrui **efektivan** domon, en kiu oni povas oportune loĝi, tiu devas ĉirkaŭhaki kaj uzi diversajn artaĵojn." (kajero 8, p. 44-45)

"La Esperanta alfabeto ne sole enhavas en si nenion, kio devigus nin fari pro ĝi iajn diversajn **rompojn** en la tute preta kaj jam de dudek jaroj vivanta lingvo, sed eĉ se mi **nun**, post tiu granda sperto, kiun mi havas, devus krei Esperanton denove, mi ne donus al ĝi alian alfabeton, ol ĝi nun havas." (kajero 8, p. 175)

Kaj jen iom da aliaj aktualaj pensoj:

"Ĉie, kie nur la senco permesas, mi preferas formojn pli mallongajn..." (kajero 6, p. 44)

"La kongreso devas efiki sur la **sentojn** kaj fari **impreson**, kiel eble pli grandan kaj neforgeseblan impreson." (kajero 6, p. 170)

"Al la fondo de via Societo Esperantista por la Paco mi deziras la plej bonajn sukcesojn; kaj mi estas konvinkata, ke tiu ĉi societo multe akcelos ambaŭ aferojn, t.e. la esperantismon kaj la tutmondan pacon, kiuj laŭ sia esenco estas tre forte ligitaj inter si reciproke." (kajero 7, p. 89)

"Kredu, ke ĉio, kio per si mem estas bona kaj justa, malgraŭ ĉiuj insultoj pli aŭ malpli frue devas venki kaj nepre venkos." (kajero 7, p. 377)

"Jam delonge mi konvinkiĝis, ke la mondo kliniĝas nur antaŭ la **forto de plenumitaj faktoj**." (kajero 7, p. 382)

66a UNIVERSALA KONGRESO:

Malmultekoste loĝi

ĈAR LA BELECO de Brazilio (vidu la sekvantajn paĝojn) okupis iom da spaco en ĉi tiu numero, la Kongreso mem apenaŭ menciigis ĉi-foje. Kelkajn gravajn novaĵojn ni volas mencii ĉi tie: Jam estas tute certe, ke la 66a UK disponos pri 500 litoj en aparte malmultekosta komuna loĝejo, kie eblos loĝi kontraŭ 50 gld. dum la tuta kongresa semajno. Ĉiuj gejunuloj, kiuj aliĝos al la Kongreso, povos loĝi samloke — tute senpage. La Kongreso ricevis tre favoran ofertan ankaŭ por la aliaj loĝeblecoj: hotelaj litoj kostos de malpli ol 30 guldenoj por nokto, ĝis 90 gld. por unulita ĉambro en luksa hotelo. Tamen, necesas konsideri, ke ĉiuj hoteloj en Brazilio estas sufiĉe lastatempe konstruitaj kaj do komfortaj eĉ kiam ili ne estas alte klasifitaj. Ĝis la komencaj tagoj de decembro jam estis registritaj ĉ.720 aliĝoj al la 66a UK. Nun ŝajnas tre probable, ke Brazilo eldonos specialan poŝtmarkon okaze de la Kongreso.

"La rapida kaj bonega disvolviĝo de la UEA min tre ĝojigas, kaj mi esperas de via Asocio tre multe da bono por nia tuta afero." (kajero 8, p. 303)

Espereble, baldaŭ aperos la lasta, 9a kajero (jaroj 1909-1917). Krome, la eldonisto esperas kompili la 10an kajeron *Postrikolto de Ludovikaĵoj*. Ludovikito intencas regali nin ankaŭ per ĉiuj tradukoj de Zamenhof en kvar volumoj.

Sed eĉ tio ne estas ĉio: jam aperis la kajero 1-bis, kiu portas la titolon *La inkunabloj de Esperanto* kaj entenas detalegan priskribon de ĉiuj 29 verkoj aperintaj en la jaroj 1887-1889.

Kaj aldone al ĉio, sur reklama bildo mi gapas al ok belaj volumoj de la "jam kompletigita biografio romano (aŭ romana biografio?) pri L.L. Zamenhof", kiun eldonis (verkis?) japanlingve la sama senlaca Ludovikito.

Mi forte rekomendas al ĉiuj konsciaj adeptoj de la Internacia Lingvo, kiuj deziras intimiĝi kun la lingvo kaj ties historio el la origina fonto, aĉeti kaj legi tiun

unikan verkaron. Al la same unika eldonisto mi deziras plenumiĝon de lia grandioza plano.

Boris Kolker

La inkunabloj de Esperanto. Plena verkaro de L.L. Zamenhof, kajero 1-bis. Kioto: Eldonejo Ludovikito, 1979. 283p. 22cm. Bindita. Prezo: 36,00 gld.

Kun gradaj paŝoj eksterlanden! Plena verkaro de L.L. Zamenhof, kajero 6. Kioto: Eldonejo Ludovikito, 1979. 427p. 22cm. Bindita. Prezo: 36,00 gld.

Klopodis organizi, sed vane! Plena verkaro de L.L. Zamenhof, kajero 7. Kioto: Eldonejo Ludovikito, 1980. 446p. 22cm. Bindita. Prezo: 39,00 gld.


Por kaj kontraŭ reformoj! Plena verkaro de L.L. Zamenhof, kajero 8. Kioto: Eldonejo Ludovikito, 1980. 383p. 22cm. Bindita. Prezo: 39,00 gld.

NOTO PRI LA PREZOJ: La prezdiferenco inter diversaj volumoj ligiĝas al la daŭre altiĝantaj sendokostoj por la stokoj venantaj el Japanio. Tio signifas, ke ĉe la akiro de novaj stokoj ankaŭ la prezoj de la pli frue eldonitaj volumoj estos po 39,00 guldenoj aŭ pli multe. Kiel kutime, nederlandanoj devas aldoni 4 procentojn por la enlanda imposto, kaj ĉiuj mendantoj 10 procentojn por la sendokostoj.

BRAZILIO, URBO DE LA 66a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO:

Triumfo de la homa kreopovo

PRI SIA EPOKFARA VERKO en Brazilio, la arkitekto Oscar Niemeyer iam asertis, ke ĝiajn konstruaĵojn li desegnis tiamaniere, ke ĉiu, kiu unuafoje kontemplas iliajn formojn, povu diri al si: "ion similan mi neniam vidis antaŭe". Tian fortan impreson povos sperti la partoprenantoj de la 66a Universala Kongreso de Esperanto, ne nur rilate la arkitekturon sed ankaŭ rilate la urban planon, ĉar



La konstruistoj kaj ilia ĉefverko, planoj kaj realo: Naskiĝas la betona pireteknikaĵo de la katedralo en Brazilio.


ambaŭ estas absolute revoluciaj, precipe se oni konsideras la jarojn de la konstruado (1956-60) kaj la fakton ke ili povis konkretiĝi ĝuste en evolulando.

Tamen la graveco de Brazilio ne limiĝas al tiuj formalaj aŭ estetikaj aspektoj, kiel ajn originalaj ili prezentiĝas. La planita ĉefurbo konsistigis super ĉio historian markon en la socia kaj ekonomia evoluo de Brazilo.

La ideo ŝanĝi la ĉefurbon de Brazilo, de la marbordo al la interno de la lando, estis arde defendata de pluraj politikistoj kaj intelektuloj ekde la deka jarcento. La argumentoj variis, sed plej gravaj ŝajnis tiuj rilataj al milita strategio kaj al la evoluigaj efikoj kiujn ĝi povus alporti al la vastaj, maldense loĝataj teritorioj en la interno de la lando.

José Bonifácio de Andrada, politikisto fama pro sia batalado por la sendependeco de la brazila nacio, uzis unuafoje en 1822 la vorton **Brasília** en pledo por la nova ĉefurbo. Estas interese rimarki, ke li rekomendis al la registaro ĝin loki en la Centra Altebenaĵo, kie situas la nuna Brazilio. Post li, komitato de sciencistoj, formita en 1892, sub gvido de la belga geografo L. Cruls, faris la saman indikon kaj difinis en tiu regiono rektangulajn limojn de teritorio ampleksanta 14 400 kvadratajn kilometrojn. De tiam la "kvadrato de Cruls" estis desegnita sur ĉiuj mapoj de Brazilo kaj distingita kiel la estonta sidejo de la Federacia Distrikto.

En 1922, okaze de la festoj pro la centjariĝo de la brazila sendependeco, estis metita en Planaltina la



fundamenta ŝtono de la nova urbo. En 1934, la tiama konstitucio jam antaŭvidis la translokiĝon al la Centra Altebenaĵo. Malgraŭ ĉio, nur en 1956 la ĵus elektita prezidento Jucelino Kubitschek donis la unuan konkretan paŝon por la konstruado de la metropolo, kreante ŝtatan kompanion por tia celo. Post 41 monatoj da herkula penado flanke de dekmiloj da pioniraj laboristoj, venintaj el ĉiuj partoj de la lando kaj multe suferintaj pro la izoliteco de la regiono, Brazilio estis fine inaŭgurita la 21an de aprilo 1960.

”Ĝi naskiĝis kiel simpla gesto de persono kiu faras signon sur lokon kiun li ĵus proprigis al si: du aksoj interkruciĝantaj je rekta angulo, tio estas, la kruco-signo”.

Per tiaj vortoj, la urboplanisto Lúcio Costa komencas priskribi la originalan skizon, de li elpensitan, por Brazilio. Vere, la du aksoj konsistigas la anatomian skeleton aŭ spinon de la urbo. Ambaŭflanke de la horizontala akso, kiu estas iomete arkigita, situas la plejparto de la loĝaj sektoroj. Ĉirkaŭ la transversa akso, oni trovas la administran centron kaj kelkajn kulturajn kaj distrajn ejojn (inkluzive de la oficiala kunvenejo de la 66a UK). Ĝuste ĉe la kruciĝo de la aksoj Lúcio Costa lokis la aŭtobusan stacion; apude, ekzistas apartaj sektoroj por bankoj, hoteloj kaj komerco.

La loĝaj sektoroj estas dividitaj en ”kadrojn”, kiuj entenas difinitan nombron da samformaj (maksimume sesetaĝaj) konstruaĵoj. Ĉe la planado de tiaj kadroj, oni intencis: 1) lasi ampleksajn verdajn spacojn inter la konstruaĵoj por amuzo kaj persona moviĝado, 2) provizi ĉiun per loka disponebleco rilate bazajn servojn kaj varojn, alivorte, doni al ĝi relativan komer-

can memsufiĉon kaj la rimedojn por elementa edukado de la infanoj. Por la trafiko, oni kreis sistemon de altigitaj niveloj kaj flankaj alirejoj. Tiel oni apartigis la lokajn vojojn, kiuj servas al la kadroj, disde la rapid-cirkulaj stratoj, kiaj estas precipe la aksoj, tiel ke danĝeraj vojkruciĝoj estas ĝenerale evititaj.

Laŭ Lúcio Costa, lia plano — kies ceterajn detalojn ne utilas mencii ĉi tie — adaptiĝas al la bezonoj de administra urbo, kiu postulas laboron ordan kaj efikan, sen la tempoperdo; same taŭga ĝi estas al la intelekta produktado, kiu faras ĝin unu el la plej gravaj kulturaj fokuso de la lando.

Oni povas diri ke la arkitekturo de Brazilio obeas la principon pri ”varieco meze de la uniformeco”. Ĉi tiu principo aplikiĝas malsimile al la loĝaj kaj administraj sektoroj. En la unuaj, gravas la funkciaj aspektoj kaj tial la ”kadroj” entenas konstruaĵojn kies fasado kaj





Maldekstre estas la Kongresa Centro de Brazilio. Se ĝi ankaŭ estos tie meze de 1981, ĝi servos kiel la ĉefa kunveno de la 66a UK. Kial ni diras, 'se ĝi estos tie'? Ĉar ĝi minacas ekflugi, kvankam el fero kaj betono. Ĉu vi rimarkas la ŝtalajn kablojn, kiuj "tenas" la konstruaĵon sur la tero? Sur la dekstra foto estas unu el la pli "simplaj" publikaj konstruaĵoj.

pliaj strukturaj aspektoj estas pli-malpli rigore normigitaj kaj la inventiveco ne estas instigita de la lokaj guberniaj instancoj. Tamen en kelkaj areoj ĉirkaŭ la Lago Paranoá, distinitaj al individuaj loĝejoj, la libereco de arkitektura kreado estas tre granda.

Kontraŭe, en la administra sektoro uniformeco kaj varieco aperas samtempe. Plej trafan ekzemplon konsistigas la malsupra parto de la transversa akso, nomata "monumenta". Unualoke, situas ebenaĵo sur kiu spaliras la rektangulaj blokoj de la ministerioj, ĉiuj montrantaj tre sobran eksteraĵon. Nur je unu punkto la uniformeco de la pejzaĝo rompiĝas — rilate la katedralon, kun ĝiaj kurbaj kolonoj kreantaj pokalon. Fone de la ebenaĵo, elstaras la impona ĝemela konstruaĵo de la Nacia Parlamento. Ĝian bazon transversas plataĵo kun du duonsferoj, unu konvekso, alia konkava. La harmonia tutaĵo tiel formita impresas kiel "formoj puraj kaj geometriaj". Malantaŭe de la Parlamentejo, sur malsupra nivelo, oni povas rigardi la Tripovan Placon, en kiu situas la Federacia Kortumo kaj la Palaco de la Altebenaĵo, ambaŭ karakterizitaj de la eksterordinara svelteco kaj leĝereco de la subtenantaj arkaĵoj. Same estas kun la palacoj Itamarati kaj Tagiĝo, kiuj ŝajnas kvazaŭ ŝvebantaj aŭ apenaŭ tuŝantaj la grundon. Ili tute rompas la monotonecon de la rektaj linioj kaj ortanguloj de la klasika arkitekturo kaj samtempe kontraŭas la normojn de la funkciisma skolo, laŭ kiu ĉiu formo devas plenumi klaran rolon. La estetikismo de Niemeyer transcendas tiajn materiajn pravigojn kaj situigas la arkitekturan verkon en etoso de sonĝo kaj poezio. Li kutimas diri ke la beleco mem kreas la funkcion.

La arkitekturo de Niemeyer en Brazilio estas rezulto de plastika libereco, kiu invitas la imagpovon al konstanta kreado de novaj kaj graciaj formoj, kapablaj surprizi kaj emocii la spektanton.



La Gvidplano de Brazilio, elpensita de Lúcio Costa, estas la kerno de la Federacia Distrikto, kiu nun okupas 5 800 kvadratajn kilometrojn. Ĝia loĝantaro estas kalkulita je 1 300 000 personoj. Ĉi tiu dense okupita regiono ludas gravan rolon kiel poluso por la interna migrado, polariza centro de diversaj servoj kaj konsumo de industriaj varoj.

Komence oni antaŭvidis ke la Gvidplano — kerno de la ĉefurbo — devus esti ĉirkaŭita de kvartaloj, poste nomitaj satelitaj urboj, kies nombro kaj grandeco tamen rapide transpasis la strukturon planitan. La enmigra fluo, kaŭzita de miloj da homoj venantaj el aliaj regionoj de la lando serĉe al pli profitdona laboro, kaŭzis diversajn sociajn kaj sanitarajn problemojn. Nuntempe la Gvidplano entenas ĉ. 300 000 loĝantojn dum la 8 satelitaj urboj nombras unu milionon.

El la agrikultura vidpunkto, la Federacia Distrikto atingis rimarkindan gradon de sendependeco kaj produktas 70% de siaj bezonoj. Ĝi estas memsufiĉa rilate provizon de vegetaĵoj kaj ovo-laktaj produktoj. Sed la transforma kaj baza industrio estas tre malmulta, kio prezentas avantaĝon almenaŭ rilate la konservadon de la atmosfera pureco. Cetere, la ekonomio de Brazilio gravitas ĉirkaŭ la publikaj sektoroj pri administraj servoj, federaciaj kaj lokaj.

Pro sia eklektika kaj multaspekta socia vivo, pro la influo de ĉiuj etnoj kaj moroj de la tuta lando, Brazilio fariĝis unu el la kulture plej riĉaj urboj de Brazilo.

Roberto Passos Nogueira

Palaco de Justico (tute maldekstre) kaj Alvorada (Tagiĝo), ĉi-apude, havas la sveltecon de la japanaj papertondaĵoj.

Eta referendumo pri Esperanto

Tibor Sekelj, kiu en septembro kaj oktobro reprezentis UEA en la 21a Ĝenerala Konferenco de Unesko en Beogrado (vidu lian raporton en nia novembra numero, p. 182-184), ĉiam estis unu el la pli bonaj diplomatoj pri kiuj disponas la *Movado*. Li sendis al ni la sekvan kolekton de deklaroj pri la lingvo-problemo kaj pri Esperanto. La kolekton bonvolu legi kiel siaspecan verdikton pri la direkto, pri la sukcesoj kaj malsukcesoj de nia informa laboro.

LA OBSERVANTO de UEA, kompreneble, ne nur observas. Li ankaŭ povas labori, se li emas. Kaj lia ĉefa laborkampo estas la koridoroj, la manĝejo, la kaf-trinkejo, ekspoziciejo, do ĉiu loko kie la delegitoj havas liberan momenton.

Tie oni konatiĝas, kaj ekestas konversacio, ne ĉiam glata. Precipe en la komenco de la interparolo oni ofte estas devigata doni kelkajn bazajn aŭ pli aktualajn informojn pri Esperanto, antaŭ ol la "intervjuato" decidu plene diri siajn pensojn.

Sekvas kelkaj deklaroj favore al Esperanto. Mi verdire ne aŭdis plene negativajn opiniojn, sed mi scias ankaŭ la kaŭzon de tiu fakto. Mi ekdiskutis pri tiu temo ĉiam kun personoj kies lingvo estas diskriminaciata, kies lingvo ne apartenas al la "grandaj" lingvoj. Escepto estas s-ro Mata el Honduraso, kies lingvo, la hispana,

estas vaste parolata kaj rolas kiel unu el la laborlingvoj de Unesko.

Sed tia orientiĝo ne estas sensenca: la lingve diskriminaciataj popoloj estas tiuj, pri kiuj ni povos plej esperplene kalkuli kiam temos pri la entrepreno de la decida batalo.

T. Sekelj

S-ro Edwige Kernisan, ĝenerala sekretario de la Ŝtata Departemento pri edukado, membro de la delegitaro de Haitio:

"LA STARIGO de neŭtrala komuna lingvo, akceptebla por ĉiuj, estus ne nur utila sed vere mirinda okazaĵo. Mi kiel haitiano, kaj certe ankaŭ mia registaro, bonvenigus ĝin entuziasme. Ĉar en mia lando la popolo parolas la kreolan lingvon, sed sur oficiala nivelo ni uzas la francan. Kvankam nia lando akiris la sendepen-



BLINDULOJ:

Sociologia esploro pri IABE

"STATISTIKAJ donitaĵoj pri la membraro de Itala Asocio de Blindaj Esperantistoj (IABE)" estas la titolo de 12-paĝa, informriĉa (23 tabeloj) resumo de sociologia esploro, kiun entreprenis Daniela Bottegoni (Via Dalmazia 15, I-60100 Ancona, Italio), sekretariino de IABE. La resumo aperis ankaŭ brajle en *Itala ligilo* (n-ro 2/1980), periodaĵo de IABE.

La demandaro, per kiu komenciĝis la enketo, estis dissendita al ĉiuj 86 membroj de la asocio. Mirinde estas, ke siajn respondojn sendis 76 membroj, kio estas 88,37 procentoj. Multaj interesaj kaj utilaj donitaĵoj rezultis el la enketo: preskaŭ ĉiuj membroj de IABE havas telefonon, ĉ. 90 procentoj disponas almenaŭ pri ia sonbenda aparato, du trionoj estas viroj, meza aĝo

de la membroj estas 51,3 jaroj, la gvida profesio ĉe la italaj blindaj esperantistoj estas la instruista, kiun sekvas la telefonistoj kaj pensiuloj. La enketo dediĉis apartan atenton al la esperantisteco de la membroj de IABE. Pli ol 70 procentoj de la enketitoj informiĝis pri Esperanto pere de amikoj, kaj pli ol duono lernis la lingvon meminstrue. Nur ĉ. 16 procentoj konas la Esperantan brajlan skribon, kvankam ĉ. 90 procentoj legas Esperantan revuon, kaj pli ol duono jam ĉeestis almenaŭ unu internacian Esperanto-kongreson. Ŝajnas, ke scii aliajn fremdajn lingvojn nur pligrandigas la interesiĝon pri Esperanto, ĉar nur malpli ol 7 procentoj de la enketitoj lernis neniun alian fremdan lingvon krom Esperanto. Tamen, la enketo montras, ke la lingva nivelo de la membroj de IABE apenaŭ estas kontentiga.

La celo de ĉi tiu enketo estis havigi al la Itala Asocio de Blindaj Esperantistoj la informojn, kiujn ĝi bezonas por fari pli konkretajn planojn kaj programojn pri la disvastigo de la Internacia Lingvo inter la italaj blinduloj.

deon jam en 1804, la franca lingvo nin plue, vole-nevole, igas dependaj de la franca kulturo, de kiu jam estas tempo ke ni sendependiĝu.”

S-ro José Ignacio Mata, sekretario en la Ministerio pri Kulturo kaj Turismo, Honduraso:

”ESPERANTO? Jam delonge mi atendas, ke oni faru ion tiurilate en la monda skalo. Mian lingvon, la hispanan, oni parolas en la plej granda kvanto da landoj. Tamen, ekster Latinameriko kaj Hispanujo, ĝi ne estas komprenata. Dum vojaĝoj, en oficiala kaj neoficiala komunikado mi forte sentas la bezonon de komuna lingvo. Sed tiun problemon devas preni en siajn manojn unuavice Unesko.

Mia infano estas nun dujara, sed mi forte esperas ke, kiam ŝi estos plenkreska, ŝi povos travojaĝi la mondon, amikiĝi kun personoj el ĉiuj landoj, uzante unusolan lingvon, Esperanton. Parenteze: ĉu vi povus al mi havigi lernolibron? Mi ŝatus lerni ĝin.”

S-ino Karine Marie José Mathey, membro de la delegitaro de Kongio:

”LA LINGVA BARO estas unu el la plej gravaj obstakloj por la kompreniĝo inter la homoj de la mondo. Precipe nun, kiam la baroj de koloro kaj kulturo ĉiam pli mildiĝas, restas la lingva problemo kiu postulas solvon.

En la hodiaŭa mondo superregas tiu lingvo, kiun apogas forto politika, armea kaj ekonomia, kaj tio certe ne



Multaj ligas siajn esperojn al la Internacia Lingvo: S-roj Edwige Kernisan (Haitio), Mohamed El Fasi (Maroko) kaj José Ignacio Mata (Honduraso). Ĉi-apude: s-ino Karine Marie José Mathey (Kongio).

estas solvo, ĉar la lingva kaoso ĉiam pli komplikiĝas. Nuntempe, ekzemple, Unesko laboras en 6 lingvoj — angla, franca, hispana, rusa, araba kaj ĉina. Baldaŭ verŝajne postulos la saman statuson la svahila, la haŭsa kaj kial ne ankaŭ la kongia kaj multaj aliaj! La sola solvo evidente estas neŭtrala lingvo kiel Esperanto. Atingi tion sendube postulas paciencon kaj energian batalon, sed valoras! Mi certe volonte lernos kaj uzos ĝin, se tia decido estos farita.”

S-ro S.B. Paik, ĉefo de la Nacia Komisiono por Unesko, Korea Respubliko:

”MI NE PAROLAS Esperanton, sed mi scias ion pri la lingvo kaj la movado. Mi ĉiam havis intereson pri ĝia progreso. Bedaŭrinde, ŝajnas al mi, ke la interesiĝo pri Esperanto malgrandiĝis lastatempe. Sed tio ne devas malkuraĝigi ĝiajn adeptojn. Unekso estas la ĝusta

instanco kiu devus organizi vastan agadon por la enkonduko de Esperanto en la internaciajn rilatojn.

La enkonduko de tiu internacia lingvo pleje favorus la parolantojn de la t.n. malgrandaj lingvoj, kiuj ne estas parolataj de alilandanoj. Ekzemple mi parolas la anglan lingvon, krom mia gepatra, la korea. Sed mi devis lerni ĝin dum ok jaroj en la lernejo. Tamen, kiam mi diskutas kun anglalingvano, mi ĉiam sentas min malplivalora, ĉar, dum mi baraktas kun la ideoj unuflanke, kaj kun la lingvo aliflanke, mia kunparolanto transformadas la ideojn en vortojn nature kaj sen malfacilaĵoj.”

S-ro Hasan Masoud Ali, sekretario de la Ministerio pri Kulturo kaj Sporto, Zanzibaro, Tanzanio:

”ESTUS EGE UTILA la enkonduko de Esperanto, ĉar ĝi ne apartenas al iu difinita nacio, politiko aŭ ideologio, kaj tial ĝi nenion altrudus al siaj uzantoj. Aparte ĝi estus signifoplena por la evolupopoloj, ĉar la neŭtraleco de tiu dua lingvo permesus al ili evoluigi kaj refirmigi sian propran kulturan identecon.”

Prof. Sergej Bubnov, eŭropa prezidanto de Internacia Asocio por Tertrem-inĝenierado, Jugoslavio:

”LA ENKONDUKO de Esperanto momente ŝajnas al mi iluzio. Tamen, mi diru al vi, ke en iu tempo, mi firme kredas, la homaro adoptos tiun logikan kaj ege necesan interkomprenilon. Mi mem tiam lernis ĝin. Eble ne sufiĉas la propagando kiun la adeptoj de Esperanto faras. Oni devus ne nur plifortigi la propagandon, sed ankaŭ ekagi rekte sur registara nivelo. Tio certe estus granda paŝo antaŭen. Ne nur ke mi mem lernus ĝin tuj denove, sed mi estas konvinkita ke mia neregistara internacia organizaĵo adoptus ĝin. Mi mem tion proponus. Cetere al mi ŝajnas, ke la intenco proponi Esperanton kiel komunan interkomprenilon al la movado de nealiancitaj landoj estas la ĝusta vojo por ke Esperanto sukcesu fariĝi vere internacia lingvo.”

D-ro Mohamed El Fasi, ministro, eksrektoro de la Universitato de Rabat, Maroko:

”DE KIAM mi eksciis iom pli pri Esperanto, mi forte entuziasmiĝis pri ĝia ideo. La sola afero kiu min ĝenis, estis la fakto ke ĝia vorttrezoro estas prenita plene el la eŭropaj lingvoj. Tiu fakto flankenlasas ĉiujn aliajn kulturojn, kaj ankaŭ la araban, kun ĝia riĉa multjarcenta heredaĵo. Sed nun, kiam mi eksciis ke oni laboras pri la kompletigo de Esperanto per arabaj kaj aliaj afrikaj kaj aziaj vortoj, mi devas diri, ke la internacia lingvo havos en mi fortan apoganton.”

S-ro Mintsa Eya, delegito de Gabono, profesoro de la Universitato de Gabono:

”MI JAM DELONGE SCIAS pri Esperanto, tamen mi neniam havis okazon lerni ĝin. Sed eĉ se mi havus okazon, mi ne estus ĝin lerninta, ĉar mi ne vidis ĝian tujan utilecon. Sed, se ekzemple Unesko ĝin apogus, mi ne nur lernus sed eĉ forte favorus ĝin. Oni devus Esperanton enkonduki precipe en kulturajn interŝanĝojn kaj kulturan agadon ĝenerale, ĉar tio preparus favoran medion por la ĝenerala akcepto de tia neŭtrala komuna lingvo, sen ia ajn diskriminacio.”

Kibernetikistoj por Esperanto

JAM DE PLURAJ JAROJ aperas, ĉi tie kaj en aliaj movadaj — kaj ne nur movadaj — gazetoj, novaĵoj pri la ekuzo de Esperanto fare de kreskanta nombro de kibernetikistoj. Elstaras inter ili d-ro Helmar Frank (FR Germanio), kiu ĉiam pli forte trudiĝas kiel unu el la plej gravaj movadaj nomoj sur la faka kampo.

Meze de septembro okazis unu el la ĉefaj ĝisnunaj atingoj de tiu agado, en Namuro, Belgio, ĉe la 9a Internacia Kongreso de Kibernetiko, sub zorgo de Internacia Kibernetika Asocio, grava scienca organizaĵo, kiu eldonas propran fakrevuon *Cybernetica*. En la kadro de la Kongreso prezentiĝis la 3a Internacia Konferenco pri la Lingva Problemo en la Scienco, kiun partoprenis tuta aro da renomaj esperantistoj, inter kiuj ni menci la nomojn de B. Popović (Jugoslavio), A. Münnich (Hungario), B. Sherwood (Usono), W. De Smet (Belgio), P. Neergaard (Danlando), H.-D. Maas (FR Germanio), F. Pennacchietti (Italio) kaj, kompreneble, Frank kun pluraj kunlaborantoj el Paderborn (FR Germanio). En la Kongreso partoprenis, kiel interpretisto, ankaŭ Francisko Simonnet (Francio), antaŭa komitatano de UEA.

La uzo de Esperanto dum la Kongreso havis nur eksperimentan karakteron, sed tiun karakteron ĝi perdis: la Estraro de IKA akceptis la proponon de d-ro Frank, ke ĉe la venonta kongreso la Internacia Lingvo estu plenrajta laborlingvo. Aŭdiĝis eĉ radikalaj sugestoj, ke post la 10a Kongreso, ĝi fariĝu la **sola** laborlingvo. Esperanto cetere aldoniĝos al la lingvoj uzataj en la menciita revuo *Cybernetica*. Esperanto-uzo en la kongresaj laboroj tiel impresis la prezidanton de unu nacia kibernetika organizaĵo, ke li deklaris sian intencon tie enkonduki ĝin kiel duan lingvon — intenco des pli impona, ĉar temas pri la Usona Societo por Kibernetiko.

En la novan naŭmembran Estraron de IKA elektiĝis kvin parolantoj de Esperanto: kiel prezidanto, G. Boulanger (Belgio); kiel vicprezidanto, H. Frank; kaj F. Pennacchietti, O. Sangiori (Britio) kaj T. Ören (Kanado).

JAPANIO:

Viroj sklavas al "laboreja familio"

ESPERANTO-DOMO de Tokio, por la 9a fojo, organizis la Internacian Esperanto-Renkontiĝon (IER) ĉe Junulara Domo de Mizumoto, norde en Tokio, de la 7a ĝis la 9a de novembro, kun 25 partoprenantoj. La programon plenigis prelegoj kaj diskutoj pri la ĉefa temo "Diskriminacio".

La 7an vespere, Stefan MacGill kaj Loes Demmendaal malstreĉis la komencon de la renkontiĝo per ridigaj skeĉoj; pri "Aŭstralio" prelegis Steve Cooper kun aparta atentigo pri diferencoj de la laborkondiĉoj en Aŭstralio kaj Japanio; kaj oni ĝuis 8-milimetran filmon far Ragnar Baldursson pri la lasta IER-8.

La 8an, abundis parolado kaj aŭskultado por ĉiuj ĉeestantoj. Post prezento de enkondukaj tezoj de Baldursson kaj Ken'iti Huzimaki sekvis raporto de Tosio Tezuka pri aspektoj de diskriminacio al koreanoj loĝantaj en Japanio.

La posttagmezon riĉigis ankoraŭ 4 prelegoj: Yosimi Umeda skizis la lingvan situacion en Usono, MacGill malkaŝis la lingvan ĝangalon en Eŭropa Komunumo, Demmendaal atentigis pri seksaj antaŭjuĝoj manifestiĝantaj en niaj lingvaj kutimoj, Makiko Hukunaga sekvis kun klarigo kial ŝi iniciatis lanĉi la japanan version de *Sekso kaj egaleco*.

Vespere okazis 4-hora diskutado en du grupoj: pri la seksa kaj pri etna-rasa diskriminacioj. La unua grupo malkovris, ke ne emancipita estas ne nur virino sed ankaŭ viro, kiu devas sklavi al sia "laboreja familio" kaj al sia tradicia pensmaniero, kaj konkludis, ke necesas krei mondon, en kiu la "homoj" (ne "viroj" aŭ "virinoj") povus efektive disvolvi sian propran personecon. La alia grupo konstatis ĉe ekzemploj pri koreanoj-japanianoj kaj japanaj kasto, ke la diskriminacio fontanta el "malegaleco" aparte grandiĝas sub registaroj en malordaj periodoj por tiel forturni la malcontenton de la popolo. Oni konkludis, iom optimisme, ke pro la ŝanĝo de generacioj kaj pro la socia malizolemo de la nuntempa mondo, la antaŭjuĝoj pri specifaj homgrupoj malfortiĝos, kondiĉe ke neniam plu revenos tiaj nigraj tagoj.

RUMANIO:

Fondiĝis junulara sekcio

DUM la 3a jarkunveno de rumanaj geesperantistoj, meze de septembro 1980 en Timișoara, oni dediĉis apartan atenton al la agado en la junularaj medioj. La jarkunveno, kiun partoprenis cento da reprezentantoj de ĉ. 30 lokaj Esperanto-klubo, decidis fondi junularan sekcion de la Kolektivo Esperanto-Interlingvistiko, ekde 1978 funkcia kiel landa organizaĵo de rumanaj esperantistoj. La gvidanto de la nova sekcio fariĝis Mariana Cemicova-Buca; la adreso: Junulara Subkolektivo de Kolektivo Esperanto-Interlingvistiko, Bd. Vasile Parvan 4 (Universitate), R-1900 Timișoara, Rumanio. La nova junulara sekcio en Rumanio volas kunlabori kun TEJO kaj tiucele ĝi elektis apartan respondeculon: Florian Bociort, Bd. Eroilor 7/D, R-1900 Timișoara. La junulara fako de la Kolektivo Esperanto-Interlingvistiko estas la kvina sekcio de tiu organizaĵo; jam antaŭe fondiĝis la sekcioj pri bibliografio, informado, metodiko kaj tradukado.

Pli efika estus antologio

Recenzas Leopold Knoedt (Brazilo):

Skizo de sŭahila metriko, Nino Vessela (1947-). Bel-linzone: Hans Dubois, 1980. 65p. 21cm. Fotokopie.

La aŭtoro deziras diskonigi la metrikon sŭahilan (li anstataŭigas la postkonsonantan v per la por multaj pli facile prononcebla ŭ), por ke la Esperantaj poetoj eventuale ĉerpu el ĝi, tiamaniere pli internaciigante la lingvon.

Tiu provo devas nin interesi speciale, ĉar sŭahilo ja funkcias kiel interetna lingvo en parto de la orienta Afriko, kaj la tendenco estas, ke ĝin uzos ĉiam pli da alilingvanoj. Ni do observu la evoluon de tiu uzado, por el ĝi tiri instruojn, eble valorajn. Ĉar la orientafricanoj ja faras tiun aplikadon multe pli ofte ol ni esperantistoj, la evoluo certe estos ankaŭ pli rapida ol ĉe ni.

La plej karakteriza trajto de la sŭahila poezio estas la agorda rimo, eĉ sen apoga konsonanto aŭ vokalpareneco, kiuj ĝin validigus en Esperanto laŭ kaloĉaja diktato. La rimarangoj mem ne multe diferencas de tiuj en aliaj lingvoj, dum la longo de la versoj iom eksterordinaras, kvankam ŝajne la modernaj poetoj adoptas pli mallongajn.

Pli efika tamen ol preskaŭ pure didaktika verko kiel tiu ĉi, estus antologio de sŭahila literaturo proza kaj poezia. Ke unu fojon plu pruvigu, ke homoj kun plataj nazoj kaj malhela haŭtkoloro havas la samajn sentojn kaj tiujn same bone esprimas kiel mallarĝnazaj blankhaŭtuloj. Tio evidentiĝas jam de la kelkaj specimenoj versigitaj de Renato Corsetti (cetere eble tre fidelaj laŭforme, ĉar esee prezentitaj, tamen ĝuste tial ne sufiĉe poeziaj).

Mendu ĉe UEA: 14,40 (por Nederlando 14,97) gld., plus sendokostoj 10%.

SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ,
asocio sen profita celo, serĉas

universitatajn lekciistojn

por siaj venontaj sesioj. Ĉiufaka propono
pritraktota. SUK, BP 9, B-4000 LIEGE
X, BELGIO.

Islanda Esperanto-Asocio okazigos

INTERNACIAN KULTURAN SEMAJNON

en **Stykkishólmur**, okcidenta Islando, de la 18a ĝis la 24a de julio 1981. Prelegoj kaj kursoj pri geologio, islanda kulturo, Esperanta poezio. Konversaciaj rondoj. Diversaj ekskursoj.

Prospektoj kaj aliĝiloj haveblaj ĉe: Islanda Esperanto-Asocio, Pósthólf 1081, Reykjavík, Islando.

Ĉu prozo pli konvenus?

Recenzas W. Krikke (Nederlando):

En senvoja sovaĝejo, de Jacob Maris. El la nederlanda trad. Rejna de Jong. Glasgow: Kardo, 1979. 24p. 20 cm.

La aŭtoro spertis multajn malbonŝancojn, fine komencis drinki kaj uzi narkotaĵojn, kio necesigis flegadon en psikiatria hospitalo. La poemojn li verkis dum kaj post la malsano. Pere de ili li provas komprenigi la malstabilecon de la homa menso.

La 21 poemoj estas fakte duone poezio, kaj duone prozo. Legante ilin mi plurfoje pensis, ke proza rakonto pli efike bildigus la suferojn de la aŭtoro. Rejna de Jong lerte tradukis la malfacilajn pensojn de Maris. La aspekto de la libreto estas plaĉa.

Mendu ĉe UEA: 8,10 (por Nederlando 8,42) gld., plus sendokostoj 10%.

Por kompreni Bulgarion

Recenzas Detlev Blanke (Germana DR):

Apostolo de libereco; Portreto de Vasil Levski sur la fono de Bulgario de la 19a jarcento (1967), de Mercia MacDermott. Trad. N. Aleksiev. Sofia: Sofia Pres, 1980. 359p. Ilus. 21cm. Bindita.

Lige al la 13-jarcenta jubileo (en 1981) de la bulgara ŝtato, estas tre bonvene konatigi la Esperantan legantaron kun "la plej originala organizanto de la naci-liberiga movado en la 19a jarcento" (p. 5), Vasil Levski (1837-1873).

La angla verkistino Mercia MacDermott, surbaze de multaj propraj esploroj kaj abunda dokumentaro, atentokapte kaj vivece prezentas gravan etapon en la batalo de la bulgara popolo kontraŭ la turka jugo.

Etapo grave stampita de Vasil Levski, la unua bulgaro kiu ellaboris kaj aplikis principojn de revolucia popola batalo kontraŭ diktatora reĝimo, precipe koncerne la starigon kaj funkciigon de sekretaj revoluciaj organizaĵoj agantaj ne izolate sed subtenataj de la popolo. Tiuj liaj principoj ne perdis sian aktualecon. En 24 ĉapitroj la leganto konatiĝas kun la kontraŭturka batalo, en kies centro staras la juna monaĥo Levski, kiu, forĵet-

inte sian monaĥecon, aliĝis al hajdukaj taĉmentoj kaj baldaŭ komprenas, ke ne la unuopaj operacoj kontraŭ la turkoj sed la mobilizo de la tuta popolo necesas por la liberigo el "Sub la jugo". (Bonvenas ĉi-teme, relegi tiun faman romanon de I. Vazov, ankaŭ esperantigitan). La aŭtorino, kiu verkis ankaŭ aliajn librojn pri la bulgara historio, venas al konkludo, ke Levski estas unu el tiuj "maloftaj naciaj herooj", kiu "restas heroo eĉ tiam, kiam la historiistoj provas uzi siajn arklampojn kaj "skalpelon" (p. 14), konkludo, kiun oni post la lego volonte subtenas.

La traduko facile legiĝas, lingvaj disputindaĵoj maloftas, preskaŭ mankas preseraroj. Krom 22 fotoj la libro, tole bindita, entenas ankaŭ bonvenan glosaron pri pli oftaj turkaj kaj bulgaraj esprimoj, donantaj iom da historia koloro. Bonvena estus ordigita listo de la riĉe citita dokumenta kaj esplorverka materialo pri Levski. Tre digna verko, faciliganta la komprenon de la historia kaj la nuna Bulgario.

Mendu ĉe UEA: 17,40 (por Nederlando 18,09) gld., plus sendokostoj 10%.

Renkonte al la Jaro de Handikapuloj

Recenzas W.A.M. van Heugten (Nederlando):

Analizo de la interrilatoj inter la blindularo kaj la diversaj socioj de la eŭropaj industriigitaj landoj, de José Starck. Brusela Libera Universitato, 1980. 204p. 21cm. Ringe bindita.

Ĉi tiu eldonaĵo estas disertacio de José Starck, prezidanto de la Federacio de Belgaj Blinduloj, por la akiro de la grado de licenciato pri sociaj, politikaj kaj ekonomiaj sciencoj.

La analizo estis verkita en 1972 kaj 1973, kaj poste aktualigita ĝis 1980. La libro aperis kiel kontribuo de s-ro Starck al la Internacia Jaro de Handikapuloj — 1981. Ĝi konsistas el kvar partoj kaj konkludo. En la dua ĉapitro de la unua parto la aŭtoro detale pritraktas, interalie, la sovetan kaj la svedan blindulasociojn. Apartan atenton ricevis rajto de la blinduloj je laboro

kaj la situacio de la blindularo en la Tria Mondo. "Tiu ĉi memuaro" — oni legas en la antaŭparolo — "estas la pli funda esploro de iu antaŭa studado, kiu nur rilatis al la anoj de la lieĝa blindulunuiĝo. Tamen, estas certe ke ĝiaj ĉefaj rezultatoj estas pli-malpli aplikeblaj al la tuta blindularo belga kaj ankaŭ okcidenteŭropa."

Tio ĉi estas unu el tiuj libroj, kiuj denove montras la praktikan uzeblecon de Esperanto por gravaj sciencaj celoj.

Mendu ĉe UEA: 30,00 (por Nederlando 31,20) gld., plus sendokostoj 10%.

Moderna, sed postulema legendo


Recenzas Franjo Gruić (Jugoslavio):

Marfilo Karlo; Legendo el Kornvalo, de Jean Bomford. Coatbridge: Kardo, 1978. 10p. Ilus. 21cm. ISBN 0 905149 07 6.

Jen ĉarma moderna legendo entenanta la eternan homan deziron pri la transformo de sovaĝo al mildeco. Kvankam oni nomas ĝin "libro por komencantoj", ĉi tiu broŝureto estas leginda por ĉiuj. Per siaj stilo kaj naiveco ĝi memorigas pri *Karlo* de E. Privat kaj *Fabeloj* de Andersen. La rakonto estas simpla: feroĉa drako, terura monstro, vivis solece en roka kaverno apud la bordo de la maro. Ĝi elspiris fajron, estis kovrita per akraj skvamoj kaj ĝia vosto havis akran timigan pikilon. Iun tagon salutis ĝin la junulo Petro per amikaj vortoj, kaj la monstro komencis metamorfozi. Ili ambaŭ amuziĝis, petolis, kaj — fine — la drako fariĝis Marfilo Karlo aŭ, pli simple, Foko.

Por la tre junaj komencantoj la legendo estas tamen postulema. La vortprovizo estas ampleksa, la vorto *graŭli* ne troviĝas en *PIV*. Mi trovis nur du preserarojn. El pedagogia vidpunkto estus konvene dividi la rakonton en kelkajn ĉapitrojn, ekzemple: drako, renkonto, amuzo, renaskiĝo (aŭ: metamorfozo), vilaĝanoj, nova vivo.

Mendu ĉe UEA: 2,40 (por Nederlando 2,49) gld., plus sendokostoj 10%.



ĈU VI ANKAŬ POR LA ĈI-FOJA LIBROTAGO SUKCESIS NE DONACI AL VI MEM LA VERKON SEN KIU NE EBLAS EFIKE LABORI POR ESPERANTO?

Jam pli ol du mil personoj aĉetis ĉi tiun verkon, ĉar "... ĝi estas la plej bona kaj plej informriĉa libro iam ajn verkita pri la Internacia Lingvo." (M. Duc Goninaz)

Esperanto en perspektivo; Faktoj kaj analizoj pri la Internacia Lingvo. Verkis Ivo Lapenna (ĉefred.), Ulrich Lins (red.) kaj Tazio Carlevaro. Eldonis UEA/CED, 1974. 876p. 20,5x14cm. 65 ilustropaĝoj. 40 indeksopaĝoj. ISBN 92 9017 016 6. Prezo: 84,00 (por Nederlando 87,36) gld., plus sendokostoj 10%.

Recenzas Mauro Nervi (Italio):

La kalva kantistino, de Eugène Ionesco (1912-). El la franca trad. G. Lagrange. Paris: TESPAn, 1978. 56p. 25cm.

Skandalo estas ofta reago ĉe nacilingvaj surscenigoj de tiu ĉi granda ĉefverko de la komika teatro; ĝian malfacilan humuron ĝenerale ne perceptas granda parto de la publiko, kiu kutimiĝis al la varietejaj spritaĵoj aŭ al la cerbrongaj vulgaraĵoj de la televidaj programoj. Humuro estas ja malfacila arto; malmultaj homoj sukcese ĝin praktikis en tiu ĉi jarcento; kaj inter tiuj, certe troviĝas la nomoj de Kafka, Bulgakov, Nabokov, Ionesco.

La kalva kantistino estas unu el la plej fruaj verkoj de la aŭtoro, sed ĝi jam prezentas lian rafinitan kapablon primoki la falsan logikemon de la etburga klaso, kies senhorizonta amo al ordo kaj trankvilo montriĝas en sia plej vera aspekto kiel neŭroza ripetado de sensencaj konceptoj. Humuro fontas el tio, ke la logikprocezoj de la rolantoj estas tute normalaj kaj ĉiutagaj, sed aplikiĝas al seninteresaj temoj kaj nerimarkite alvenas al absurdaj konkludoj: tiel, per ia sobra banaleco, Ionesco saltas de temo al temo dum liaj rolantoj detruas, per preskaŭ neintencita burlesko, la solenajn regulojn de la klasika teatro (kaj ja ne estas hazarde, ke teatraj avangardoj naskiĝas ĝuste per tiu ĉi granda akto de burlesko).

"Neverŝajna, sed tamen pli vera ol la vero mem": tiu ĉi frazo de Ionesco povas do taŭge resumi la sencon de lia humuro, direktita al evidentigo de la burĝaj maladekvatoj. La intrigo ne havas apartan rolon en tio. La verko fakte temas pri angla paro (ges-roj Smith), kiu ricevas viziton de ges-roj Marten, ŝajne geedzoj; post kelka tempo, oni sonoras ĉe la enirpor-do, kaj surscenejiĝas la Kapitano de la Fajrobrigado, kies kontribuo al la konversacio klimaksigas la absurdon. La mallonga teatraĵo, post foriro de la Kapitano, finiĝas per brutala reciproka insultado de la du paroj, en kiu oni tamen uzas ne insultvortojn, sed onomatopeaĵojn, ŝajnajn proverbojn, minacajn sensencaĵojn ("Ruza kruĉo!" "Koloman!" "Kaloĉaj!" "Fajlu la ajlon!"). Kaj ankaŭ la fino, verdire, ne ekzistas: la kurteno fermiĝas dum gesinoroj Marten denove komencas la unuan scenon. Etburgeco, same kiel absurdeco, estas universala kaj eterna. Cirklo estas la plej taŭga formo por priskribi ĝin.

Mi jam aludis, ke eĉ en nacilingvaj medioj *La kalva kantistino* ofte vekis indignajn reagojn fare de homoj, kiuj ne komprenis, ke ĉiu absurdaĵo estas nova komika aspekto de la problemoj, kaj ne monotona ripeto. Tia nekomprenejo eĉ pli facile okazas fare de esperantistoj, kiujn Schwartz (cetere granda prozverkisto) bedaŭrinde kutimigis al la primitiva humurformo de vortludoj. Tial la reagoj estis ofte malestimaj, repuŝaj: "Mi hontas, ke mi estas membro de la Akademio de

Esperanto, tial ke la aŭtoro estas membro de la Franca Akademio" recenzis iu akademiano, kiu tute prave sentis sin primokata de ĉi tiu satiraĵo, senkompata kontraŭ ĉiu filistra "normaleco".

Malgraŭ kelkaj makuloj ie-tie, la traduko bone fluas, kaj foje atingas vere altan nivelon; ĝenerale la leganto sukcese ĝuas la komikan forton de la komedio. Sed mi volas aparte laŭdi kaj danki TESPAn, kiu eldonis kaj sursceneje prezentis la verkon. En tempo, kiam la movado aplaŭdas kaj ŝatas la brikpezajn plataĵojn de nekonataj aŭtoroj, proponi majstroverkon de la avangarda teatro estas granda pruvo de kuraĝo kaj kultura engaĝiĝo.

Mendu ĉe UEA: 7,80 (por Nederlando 8,11) gld., plus sendokostoj 10%.

Laste aperis...

Aŭdu kaj lernu 1, Sylla Chaves (1929-). Rio de Janeiro: Fundação Getúlio Vargas/Brazila Esperanto-Ligo, 1980. 136p. Ilus. 21cm. Lernolibro por portugallingvanoj, por uzo kun la legolibro *Nova amiko inter ni* de la sama aŭtoro. Prezo: 9,90 gld.

Divershumore, Rejna de Jong. Glasgow: Kardo, 1980. 36p. Ilus. de Rien de Jong. 21cm. ISBN 0 905149 13 0. Tridek poemoj, lirikaj, spritaj, protestaj. Antaŭparolo de W. Auld. Prezo: 10,50 gld.

Nova amiko inter ni, Sylla Chaves (1929-). Rio de Janeiro: Brazila Esperanto-Ligo, 1980. 86p. Ilus. 21cm. Legolibro, kiu uzas mil plej oftajn vortojn (laŭ la *Baza radikaro oficiala*). Kun i.a. kanzontradukoj. Prezo: 6,00 gld.

Vulpoj de Ĉironnup, Hiroyuki Takahasi (1923-). El la japana tr. Masahisa Niwa (1913-). Nagoya: La tradukinto, 1979. 49p. Ilus. la aŭtoro. 24cm. Bindita. Potenca protestrakonto pri kontraŭleĝa mortigado de vulpoj, kun tre belaj ilustraĵoj dukoloraj. Prezo: 18,90 gld.

Zamenhof, Lidja (1904-1942): **Lidja Zamenhof; Vivo kaj agado**, Isaj Dratwer (1905-). Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1980. 112p. Ilus. 21cm. Serio Movado 9. ISBN 90 6336 012 6. Mallonga biografio, abunde ilustrita per fotoj, kaj ĉiuj postrestintaj leteroj de la plej juna infano de Zamenhof, konata pro sia literatura tradukado kaj agado por la bahaismo. Prezo: 12,00 gld.

Diversaĵoj:

Alfabeto de Esperanto kaj facilaj frazoj, La. Kompilis Sylla Chaves. Rio de Janeiro: Sono-Viso/Brazila Esperanto-Ligo, s.j. (1980). 33 t/m. 18cm. Duflanka. SC 005 - SV 082. Kantas kaj deklamas Joel de Castro kaj aliaj. Prezo: 6,00 gld.

Glutikedaj bondeziroj. Orkolora folio, memglua, kun ok salutetikedoj (pri novjaro, sukceso, datreveno ks.). Ĉiu etikedo ampleksas 26 x 53mm. Prezo: 0,90 gld.

Kantu kaj lernu. Tradiciaj kaj folkloraj kanzonoj tradukitaj el la angla, franca kaj portugala de Sylla Chaves. Rio de Janeiro: Sono-Viso/Brazila Esperanto-Ligo, s.j. (1980). 33 t/m. 18cm. Duflanka. SC 004 - SV 081. 11 kantoj, kun teksto dorse de la koverto, en prezento de Joel de Castro, Franca Fenati kaj aliaj. Prezo: 7,80 gld.

Medalo Vilho Setälä. 250-grama, 7-centimetra bronza medalo eldonita de Finna Esperanto-Asocio honore al la konata pioniro. Eldonkvanto limigita al 500 ekzempleroj. Prezo: 66,00 gld.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, ne akceptas mendojn, kiuj ne atingas la minimuman mendosumon de 15,— guldenoj. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj. Tamen, la sumo de la sendokostoj estas minimume 3,— gld.

Ĉi tiun rubrikon redaktas: IAN JACKSON, 6A Eastcombe Road, Weston-super-Mare, Britio BS23 2TQ

KOREO:

Junaj kaj izolitaj

ANTAŬ DU JAROJ, pluraj Esperanto-organizaĵoj en Korea Respubliko unuiĝis. La landa sekcio de TEJO perdis memstaran ekziston pro tiu kunfandiĝo. Tamen, la rezulta Korea Esperanto-Asocio (KEA) montras junan vizaĝon. KEA havas propran oficejon, kio en si mem estas granda atingo. Ĝi estas malgranda, sed ĝi situas tre oportune ĉe unu el la plej centraj stratanguloj de la ĉefurbo Seŭlo. Tie la oficisto kaj kunlaborantoj estas grandparte junaj. Ni ne volas diri, ke en Koreo troviĝas nur gejunuloj, ĉar eblas tie interparoli fascine ankaŭ kun kelkaj pioniroj de la korea kaj ĉina movadoj, kaj konstati, ke KEA ricevas apogon de pluraj gravaj personecoj el la publika vivo.

Evidente okazis bona varblaboro en la universitataj rondoj en la lastaj jaroj. En la apudeco de Seŭlo troviĝas pluraj universitatoj kun Esperanto-rondoj; pluraj disponas pri ĉambreto aŭ ĉambroparto en la universitato, havas bibliotekon kaj eldonas iun periodaĵon.

Komence de oktobro okazis semajnfina renkontiĝo apud Seŭlo (v. *Esperanto*, oktobro, p. 177), kiu allogis studentojn el Pusan, Taegu kaj eĉ el la 500km fora insulo Cheju. Eŭropaj junuloj, rigardinte al la programo, povus miri pri ĝia allogpovo: 06h00 ellitiĝo, montgrimpado por spekti sunleviĝon. . . 07h00 studo . . . 09h00 studo. . . 13h00 studo. . . 19h00 studo. . . 23h00 enlitiĝo. Kvazaŭ tiom da studado ne sufiĉus, organiziĝis en unu ĉambro, ĝis la unua matene, suplementa studgrupo.

Regas granda emo paroli Esperanton kun eksterlandanoj kaj demandi pri ĉiuj aspektoj de alilanda vivo. La lingva nivelo tre varias. Elstaras la bona lingvoscio de la malmultaj junuloj, kiuj sukcesis vojaĝi eksterlanden aŭ havi alilandajn kontaktojn.

Abundas diligenteco, sed malabundas eblecoj por praktiko. Pro tio la konversacioj lernitaj el la libroj restas teoriaj. Konversaciprovoj foje povas esti iom konsternaj por eksterlanda vizitanto: "Saluton! Mi nomiĝas. . . Mi estas. . . studento en Universitato. . . Kiel vi nomiĝas?" "Mi nomiĝas. . ." "Oni ne forgesas facile sian unuan amon, ĉu?"

Jen do la korea movado: juna, izolita. Malmultaj koreaj junuloj povas vojaĝi eksterlanden, kaj venas el eksterlando tre malmultaj gastoj. Estas malfacile en tiu situacio tiri praktikan avantaĝon el la lingvo, aŭ eĉ konvinki pri ĝia utileco. La movado nutras sin grandparte per idealismo. La plano prezentita de Amri Wandel (*Esperanto*, oktobro, p. 173) faciligos kontak-

ton inter TEJO kaj KEA je organiza nivelo. Aldone al tio, troviĝas amaso de koreanoj, ĉiuj kun interesa voknomo, kiuj tre volonte korespondos kun esperantistoj el eksterlando. Kiu interesiĝas pri tio, skribu al KEA, C.P.O. Kesto 4258, Seoul-100, Korea Resp. Vizitanto al tiu lando certe spertos entuziasman akcepton kaj varman gastamon. Se vi ne komprenis la supran aludon al "voknomo", nu, petu klarigon de via nova korea korespondanto!

S. MacGill



Studentoj en Seŭlo: Granda soifo pri internaciaj kontaktoj

37a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO de TEJO, Oaxtepec, Meksikio

1981 07 10-17

Adreso: 37a IJK, Apartado Postal M-9310, México 1 D.F., Meksikio

Fine, la kotizoj!

KONGRESADO en alia kontinento kaj alia hemisfero ol tiu, kie sidas la kongresa administracio, alportas diversajn problemojn, inter ili la manko de rapidaj kontaktoj, ĉu parolaj ĉu skribaj, inter la organizantoj kaj la administracio. Per tiu burokrata formulo ni volas klarigi, kial multaj dezirantoj ankoraŭ ne havas enmane aliĝilon por la 37a Internacia Junulara Kongreso en Oaxtepec, Meksikio.

Pro la prokrastoj en produktado de la aliĝilo, estis decidite same prokrasti la limdaton por aliĝoj laŭ la kotizoj de la unua periodo. Tiu periodo kutime finiĝas je la 31a de decembro de la antaŭkongresa jaro, sed por Oaxtepec tiu limdato estas la 31a de januaro 1981. Ĝis tiu dato la kotizo por homo malpli ol 22-jara estas 225 gld.; inter 22- kaj 26-jara inkluzive, 245 gld.; pli ol 26-jara, 280 gld. Poste la kotizoj altiĝos ĝis, respektive, 240, 260 kaj 300 gld. Individuaj membroj de TEJO/UEA rajtas subtrahi 25 guldenojn.

Aliĝilo eliros kune kun *Kontakto* 68, kaj cetere iros stokoj menditaj de diversaj perantoj, landaj asocioj kaj similaj instancoj.

Belgio

• Dum la pasintjara UK en Lucerno, la Estraro de UEA aljuĝis la "Trofeon Fyne" al Belga Esperanto-Federacio, kies laborrezultoj montris i.a. konsiderindan kreskon de la individua membraro de UEA en tiu lando. Laŭ la regularo pri la Trofeo, ĝi iras ĉiun duan jaron al iu el la landaj asocioj de UEA. En la jaro kiam UEA ne aljuĝas la Trofeon, la landa asocio, kiu laste gajnis ĝin, premias per la Trofeo la plej aktivan lokan Esperanto-grupon. Dum sia unutaga kongreso, la 25an de oktobro en Lieĝo, Belga Esperanto-Federacio decidis, ke la Trofeon Fyne por la jaro 1980 ricevu la Esperanto-grupoj de Lieĝo kaj Antverpeno, kiel la plej aktivaj lokaj grupoj en Belgio.

Hispanio

• Antaŭ nelonge okazis fondkunveno de Kataluna Esperanto-Asocio, kiu celas kunordigi la Esperanto-agadon en la koncerna parto de Hispanio. La nova organizaĵo planas baldaŭ eldoni la lernolibron *Fenestro*, kiu en manuskripta formo jam estas uzata en pluraj Esperanto-kursoj en Katalunio. La unua prezidanto de la nova asocio fariĝis Manuel Casanoves, dum la sekretario estas Joan Ramon Guinón, antaŭa oficisto de UEA. Provizora adreso de la nova organizaĵo estas tiu de la sekretario: Freneria 1, Barcelona 2, Hispanio.

Soveta Unio

• Supera atesta komisiono ĉe la Konsilio de Ministroj de Soveta Unio konfirmis la programon de la kandidata ekzameno pri la ĝenerala lingvoscienco. Al tiu ekzameno devas subiĝi ĉiuj aspirantoj verki disertacion pri la menciita fako. La programo entenas ankaŭ la paragrafon "Problemoj de la interlingvistiko".

• Lingvosciencia Instituto de la Scienca Akademio de Soveta Unio akceptis du doktoriĝajn tezojn pri la interlingvistiko. Temas pri la kandidatoj: Dina Lukjanec kaj Boris Kolker. La scienca gvidanto de ambaŭ aspirantoj estas prof. d-ro Magomet Izmailoviĉ Isaev.

Nov-Zelando

• Por kuraĝigi kontaktojn kaj amikecon inter esperantistoj enlandaj kaj eksterlandaj, Nov-Zelanda Esperanto-Asocio eldonis liston de tiuj nov-zelandanoj, kiuj ĝojus renkonti kaj helpi vizitantojn. La listo enhavas 32 adresojn, kun telefonnumeroj, en 12 urboj. Post interkonsento, gastigo kontraŭ malgranda pago eblas ĉe 26 el la listigitoj. Oni intencas ĝisdatigi la liston laŭbezone. Vizitontoj al Nov-Zelando povas peti kopion de la listo kontraŭ unu respondkupono ĉe: N.Z. Esperanto-Asocio, P.O. Box 330, Wellington, Nov-Zelando.

Irlando

• En oktobro ĉi-jare, la tutlanda radio disaŭdigis intervjuon kun la nova prezidanto de Esperanto-Asocio de Irlando, Christopher Fettes. Dum pli ol duonhoron li parolis pri la Internacia Lingvo kaj la nuna stato de la Esperanto-movado. Post la intervjuo la revigliĝanta Asocio ricevis plurajn informpetojn.

Nikaragvo

• Aktiva usona esperantistino, s-ino Julie Regal, antaŭ nelonge translokiĝis al Nikaragvo, kie laŭ nia scio ne ekzistis Esperanto-movado ĝis nun. S-ino Regal (Apartado 1889, Managua, Nikaragvo) jam faris prelegon pri Esperanto en la loka lernejo, aperigis artikolon en tiea ĵurnalo kaj renkontas la unuajn interesitojn pri la Internacia Lingvo. Ŝi planas kontakti la esperantistojn en la najbaraj landoj Gvatemalo, Salvadoro kaj Kostariko.

Norvegio

• En la Solena Inaŭguro de la Kongreso en Stokholmo, la diplomatia reprezentanto de la norvega registaro anoncis, ke la tiulanda Reĝa Ministerio pri Eksteraj Aferoj decidis ekuzi la Internacian Lingvon en sia informa laboro, t.e. en la informaj broŝuroj pri Norvegio. Efektive, antaŭ nelonge aperis bela, bunte ilustrita faldfolio *Rigardo al Norvegujo*. Ĝi estas senpage ricevebla ĉe Norvega Esperantista Ligo (Boks 942, Oslo 1, Norvegio). Tamen, oni preferas petu ĝin ĉe la plej proksima ambasado de Norvegio. Supozeble sekvos poste ankaŭ aliaj, pli ampleksaj, informbroŝuroj en Esperanto pri Norvegio.



• **Japanio:** Kiam japanaj gejunuloj venas al eksterlandaj (aŭ almenaŭ eŭropaj) Esperanto-renkontiĝoj, ili ĉiuj iel nekredeble trankvilas kaj seriozmienas, kvaŭ temus pri medita aktora koncentriĝo antaŭ ol ekroli en noo-dramo. Nu, en Japanio mem ili (vidu la foton) evidente estas aliaj! La foto montras (de maldekstre): Masahiro Takahasi, Tiharu Kôgo, Hiromi Kawamoto kaj Yukio Izumi. Ili dancas kaj kantas la popularan melodion "Rasputin", kiu evidente "jam" atingis ne nur Japanion sed eĉ la esperantistojn tie. Oni do povas gaji en Japanio.

Muzikistoj

- La bulgara kantisto Prodan Prodanov, kiu prezentiĝis al la internacia Esperanta publiko pasintjare dum la Kongreso en Lucerno, gastis en oktobro ĉi-jare en Britio. Liaj tri koncertoj en la regiono de Norwich konsistis ĉefe el kantoj en Esperanto. La loka gazetaro tre pozitive prinitis la programon kaj, kiel atendeble, skribis ankaŭ pri Esperanto.

Literaturo

- En *Papers on Language & Literature* (Studoj pri lingvo kaj literaturo), periodaĵo por sciencistoj kaj kritikistoj pri lingvo kaj literaturo, d-ro Pierre Ullman aperigis ampleksan studon "Schizoschematic Rhyme in Esperanto" (Skizoskematisma rimo en Esperanto). La 9-paĝa studo aperis en la numero 4/1980, volumo 16, de tiu periodaĵo.

Konkursoj

- Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF) anoncas literaturan konkurson "La Verda Relo" por originalaj aŭ tradukitaj poeziaĵoj kaj prozaĵoj pri la fervojo. La konkursaĵoj havu limigitan amplekson: 50 versoj por la poemoj, 4 tajpitaj paĝoj por la prozo. Oni sendu la konkursaĵojn (en kvar ekzempleroj) al la adreso de la sekretario de la juĝkomisiono: s-ino Elfriede Kruse, Wiener-Str. 121, D-6000 Frankfurt 70, FR Germanio. La limdato estas **la 31a de januaro 1981**. La rezultoj de la konkurso estos anoncitaj dum la 33a IFEFF-Kongreso, inter la 15a kaj 20a de majo 1981 en Regensburg, FR Germanio.

Pacista movado

- En sia kongreso, okazinta komence de novembro en Parizo, Pacista Unuiĝo de Francio (PUF) akceptis rezolucion favoran al Esperanto. La rezolucio invitas la membrojn de la Unuiĝo lerni la Internacian Lingvon, promesas publikigi Esperantajn informojn en la revuo de PUF kaj insisti ĉe la Internacio de Militrifuzantoj, ke tiu denove ekuzu la Internacian Lingvon. La rezolucio estas rezulto de plurjara kunlaboro inter PUF kaj SAT-Amikaro.

Poŝto

- Laŭ raporto en la sveda gazeto *La espero*, dum la 65a Universala Kongreso en Stokholmo 21 778 sendaĵoj estis stampitaj per la speciala poŝta stampilo okaze de la Kongreso. La kongresanoj forsendis preskaŭ 17 000 poŝtaĵojn, kaj kolektantoj antaŭmendis ĉ. 5 000 okazajn stampojn. La sveda poŝto, kiu funkciigis specialan giĉeton en la kongresejo, konsideras tiujn ĉi rezultojn tre bonaj, kvankam tio postulis grandan laboron de la deĵorantoj en la giĉeto.

Carlén

- Honora membro kaj multjara vicprezidanto (1964-1974) de UEA, s-ro Erik Carlén, festos sian 75an datrevenon la 15an de januaro 1981. Carlén esperantistiĝis en 1923, estis longtempe estrarano kaj prezidanto de Kristana Esperantista Ligo Internacia, iniciatis la fondon de Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio (EKI), verkis, tradukis kaj eldonis kelkajn librojn en Esperanto. La populara Semajno de Internacia Amikeco estas ankaŭ unu el la iniciatoj de Carlén.

Dehoux

- La 21-jara belga pianisto kaj esperantisto Geert Dehoux, kiu brile prezentiĝis dum la 65a UK en Stokholmo, planas grandan turneon por 1981. Li emas ligi sian koncertan vojaĝon al la TEJO-kongreso en Meksikio kaj la 66a UK en Brazilo. Tio signifas, ke li povus koncerti fine de junio aŭ komence de julio en la orienta parto de Kanado kaj Usono, meze de julio en Venezuelo, Kolombio, Ekvadoro, Peruo kaj Argentino, kaj fine en Brazilo. Landaj asocioj kaj lokaj Esperanto-kluboj, kiuj interesiĝas pri la turneo, povas skribi rekte al la pianisto: s-ro Geert Dehoux, Guido Gezellelaan 16, B-2670 Puurs, Belgio. Kvankam la turneon finance helpas belgaj ŝtataj instancoj, ĝi malfacile povas realiĝi sen kunlaboro de la esperantistoj en la menciitaj landoj.

Ruĝa Kruco (Ruĝa Lunarko)

- Iam ekzistis intima kunlaboro inter la tutmonda humana organizaĵo Ruĝa Kruco (en la islamaj landoj nomata Ruĝa Lunarko) kaj la Esperanto-movado. En tiu kunlaboro ĉefrolis UEA, precipe en la periodo kiam ĝia Centra Oficejo estis en Svislando. Dum la lastaj jaroj, kelkaj izoluloj klopodas restarigi tiujn malnovajn ligojn. Ŝajnas, ke oni pleje viglas ĉi-rilate en la jugoslavia ĉefurbo, kie Esperanta rubriko regule gastas sur la paĝoj de la revuo de Ruĝa Kruco. Interesitoj pri ĉi tiu laborkampo bonvolu skribi al: s-ino Julija Bertram, Ul. Admirala Geprata 8/II, ulaz III, YU-11000 Beograd, Jugoslavio.

Persono

Golden

- Bernard Golden, usonano vivanta jam de pluraj jaroj en Hungario, estas tre verŝajne la plej aktiva verkanto en la Internacia Lingvo dum la lastaj jaroj. Kiel ni foje aludis, liaj artikoloj aperas en preskaŭ ĉiuj internaciaj Esperanto-periodaĵoj kaj oni trovas ilin ankaŭ en pluraj landaj aŭ lokaj bultenoj. Ekzemple, laŭ neĝisdata informo, **Golden aperigis 17**



diversajn artikolojn pri la centjariĝo de Volapuko, i.a. en nia revuo de julio/aŭgusto 1979. Pri la sama temo restas ne publikigitaj pliaj 13 tekstoj! Por la Movado la plej interesa estas anglalingva studo pri la influo de Volapuko al la leksiko de Esperanto. Ĝi aperis sub la titolo *The Influence of Volapük on Esperanto as Indicated by Lexical Data* kiel "LB-Papier Nr. 61, Linguistische Berichte" (1980, 26p.) ĉe la eldonejo Vieweg (Postfach 5829, D-6200 Wiesbaden, FR Germanio). Kiel sci-ate, Golden kompilas nian rubrikon "Ekzameno E" kaj ofte partoprenas (kaj gajnas) en la Belartaj Konkursoj de UEA.

ekzameno



Redaktas: B. Golden,
Csikász u. 11.III.3
H-8200 Veszprém, Hung.

RESPONDO 37

(pri la demando vidu nian numeron de novembro 1980)

1. 10 000 rubloj.
2. 15 kopekoj.
3. 5 000 rubloj.
4. 100 markoj.
5. 250 000 frankoj.
6. 0,0025 frankoj.
7. 200 spesmiloj aŭ 500 frankoj.
8. 0,5 guldenoj.
9. 0,70 frankoj aŭ 70 centimoj.
10. 100 zlotoj.

DEMANDO 38

(la respondo aperos en nia numero por januaro 1981)

La temo de ĉi tiu demando estas grandurbo en Eŭropo. Dek frazoj donas informojn pri ĝia rolo en la historio de Esperanto. Kiom da sciigoj vi bezonas, antaŭ ol vi povas diveni la nomon de la urbo?

1. Jean Borel (1868-1946), svislanda publicisto kaj eldonisto, esperantistiĝis en sia hejmlando, poste transloĝiĝis al alia lando kaj organizis la Esperanto-movadon tie. En 1903 li fondis Esperanto-grupon en la ĉefurbo kaj kunfondis la eldonejon Möller kaj Borel.
2. D-ro Zamenhof estis en tiu ĉi urbo kvin fojojn. Lia unua vizito okazis en 1905, kiam li vojaĝis al la 1-a Universala Kongreso en Bulonjo-ĉe-Mar, Francio. Li ree estis en la urbo en 1906, 1908, 1911 kaj 1914.
3. Kvankam neniam okazis Universala Kongreso en tiu ĉi urbo, post la 4a Universala Kongreso en Dreseno, en 1908, 300 kongresanoj partoprenis en kvartaga ekskurso al ĝi.
4. Vojaĝante al la 10a UK en Parizo, en 1914, kun siaj frato kaj bofratino, Felikso Zamenhof rompis al si kruon en tiu ĉi urbo kaj devis malfruiĝi.
5. Dum kongreso, kiu okazis fine de aŭgusto 1932 en la metropolo, estis fondita Internacio de Proletaj Esperantistoj (IPE).

Esperanta poŝkalendaro

La internacia magazino *Monato* (eldonata de TK/Stafeto) anoncas la aperon de tute novspeca eldonaĵo en la Internacia Lingvo — **Praktika poŝkalendaro "La jaro 1981"**. Temas pri 132-paĝa libreto en la formato A6 (10,5x15cm). Kompreneble, la kalendaro rezervis por ĉiu venontjara semajno unu paĝon de la libreto. Estas notitaj la festotagoj de tre multaj, kvankam ne de ĉiuj landoj. La aliajn 80 paĝojn okupas pluraj mapoj, amaso da statistikaj donitaĵoj, utilaj informoj por aŭtomobilistoj, svarmo da faktoj pri multaj landoj unuope kaj pri la mondo ĝenerale. Fine de la libreto troviĝas ankaŭ la Fundamento de Esperanto (en konciza formo).

Mendu ĉe UEA: 10,20 (por Nederlando 10,60) guldenoj, plus sendokostoj 10%.

6. La ĉefrolanto de la romano *Metropoliten* de V. Varankin, eldonita en 1933 kaj refoje en 1977, estas rusa inĝeniero, kiu vizitas la koncernan urbon por observi la konstrumetodojn de la subtera fervojo.
7. En junio 1936 venis ordono el la oficejo de la politika polico en tiu ĉi urbo, dekretanta la likvidon de ĉiuj esperantistaj grupoj en la lando.
8. En sia romano *Kiel akvo de l' rivero* (1963 kaj 1977), Raymond Schwartz priskribas kiel franca

junulo, Pierre Touchard, venas loĝi en la urbo por perfektigi sian scion de la lingvo de tiu lando.

9. Nuntempa loĝanto en la okcidenta parto de la urbo estas Jean Forge (pseŭdonimo de Jan Fethke), konata verkisto de originalaj romanoj kaj noveloj en Esperanto. Li naskiĝis en Oppeln, Pollando, en 1903 kaj post transloĝiĝo okupiĝis profesie pri la reĝisorado de filmoj.

10. La geografiaj koordinatoj de la urbo estas 13° 25' E, 52° 31' N.

Oficiala Informilo

N-ro 540

GRAVA HEREDAĴO POR UEA

UEA ĵus ricevis valorpaperojn kaj kontantan monon je suma valoro de 15 928,36 gld. el la heredaĵo de s-ino J.M. Ravestein-Basters, tre malnova individua membro de UEA, multjara patrono kaj membro-subtenanto. Kiam s-ino Ravestein mortis en 1965, ŝi testamentis, ke la fruktoj de ŝia kapitalo apartenu al ŝiaj filino kaj bofilo ĝis la morto de ambaŭ. Ĉar ili nun ambaŭ forpasis, ekvalidis la sekva preskribo de la testamento, nome ke la kapitalo estu dividita inter ses socie utilaj organizaĵoj, inter kiuj UEA. La Asocio memoru kun danko la belan ekzemplon de tiu membro.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Nederlando: K. Gorter.

SOCIETO ZAMENHOF 1980

DAN: 223 Preben Bagger. NED: 224 W. Spaander.

DONACIOJ 1980 (Gld.)

ĝis la 31-a de oktobro

ELDONA FONDAĴO: Argentino: R. Díaz Morilla 16,67. Sumo ĉi-jara 1 044,51.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Diversaj malgrandaj 8,27. Sumo ĉi-jara 7 684,63.

FONDAĴO CANUTO: Argentino: R. Díaz Morilla 16,67. Diversaj malgrandaj 4,50. Sumo ĉi-jara 5 071,15.

FONDAĴO OFICEJA ILARO: Nederlando: W. Akkerman 68,00. Sumo ĉi-jara 7 274,22.

ĜENERALA KASO: FR Germanio: F. Hilpert 10,85. Nederlando: O. Hagemann 300,00; O. Hoekstra 250,00; K. Kos 60,00; H.H. Weulen Kranenberg 100,00. Diversaj malgrandaj 9,30. Sumo ĉi-jara 3 983,53.

FONDAĴO AGADO ĈE UN KAJ UNESKO: Argentino: R. Díaz Morilla 16,66. Sumo ĉi-jara 2 776,66.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

INDEKSO

Revuo *Esperanto*, 73a jarkolekto, numeroj 889-900

Administrado 22, 85, 181
Afriko 34
Aisberg, E. 151, 198
Akademio 182
Aleksiev, N. 77, 151, 209
Alexandersson, S. 57
Amado, J. 165
Angelova, M. 155
Anjou, E.W. 137
Argentino 30
Ariste, P. 77
Arto 104, 155
Auld, W. 51, 69, 101, 132, 151,
171, 197
Aŭstralio 16, 42, 138
Aŭstrio 136
Bacelar, A. 178
Bakker, H. 4
Bakrin, S. (pseŭd.) 46, 111, 132
Balleux, R. 137
Bartovská, M. 155
Batalaska, B.G. 153
Baur, A. 30, 99, 151
Becker, G. 117
Belartaj Konkursoj 5, 155, 167,
168, 174, 187
Belgio 6, 36, 76, 177, 194, 213
Bellefeuille, Y. 158
Benczik, M. 54
Benczik, V. 71, 77
Bengtsson, I. 142
Bertolini, D. 10
Bibliografio 13, 33, 54, 114, 135,
172, 195, 11
Bibliotekoj 76
Blanke, D. 66, 153, 209
Blinduloj 163, 206
Boatman, D.P. 32
Bomford, J. 210
Bormann, W. 151, 153, 160
Bourdalon, H. 198
Brazilo 14, 55, 98, 121, 164-166,
203
Breitenbach, H. 78
Brennan, A. 3, 99
Britio 16, 17, 35, 98, 107, 117
Bulgario 45, 56, 139
Caprile, M. 73
Carlén, E. 214
Carlevaro, T. 111
CED 94
Centra Oficejo de UEA 85, 181
Chaves, S. 193
Corsetti, R. 2, 23, 30, 124, 151,
171



Csiszár, E. 155
Ĉeĥoslovakio 17, 63, 77
Ĉinio 26, 37, 84, 116, 137, 196
Ĉomski, N. 24
Damjanov, V. 31, 155
Danlando 116
Daŝgupto, P. 24, 36, 66, 83, 114,
133, 153, 177, 192
Dehoux, G. 155, 214
Delegita reto 86, 126
Denoël, P. 151
Diego, F. de 13
Dinwoodie, J.S. 137
Diplomatio 143
Diskriminacio 2, 26, 145, 146, 165,
208
Dobraczyński, J. 192
Dominte, C. 51
Edukado 90
Egiptio 116
Eichholz, R. 103, 111
Ekologio 44
Ekspozicioj 16, 137, 157
Eksteraj rilatoj de UEA 22, 23, 89,
92, 139, 182
Ekzameno E 18, 38, 59, 79, 140,
180, 198, 215
Eldona agado 63, 86, 201
Eldonaĵoj:
 Amo de Danto Alighieri, La 192
 Analizo de la interrilatoj inter la
 blindularo. . . 210
 Aniaro 68, 69
 Apostolo de libereco 209
 Asteriks la gaŭlo 114
 Astronomia foto-atlaso 10
 Blinda ermito 73
 Ĉiu ĉiun 74
 Ĉu li bremsis sufiĉe? 134
 Danai Vraila 51
 Danĝera ul' 53
 D-ro Jekyll kaj s-ro Hyde 113
 Du intervjuoj 171
 Dia avarulo, La 192
 El ĉina poezio 191
 Elektitaj fabloj 52
 El la nova ĝardeno 10
 El popola Ĉinio 26
 Enkonduko al finiaj geometrioj
 134
 Enkonduko al literatura kritiko
 192
 Enkonduko al ne-eŭklidaj
 geometrioj 134
 Enkonduko en la interlingvisti-
 kon 111
 Enkonduko en la originalan
 literaturon de Esperanto 132
 En senvoja sovaĝejo 209
 Esperanta bildvortaro 103
 Esperanto 87, 101
 Esperanto-dokumentoj 94
 Esperanto in rubrieken 32
 Esperanto laŭ la patrina metodo
 53

Espero, La 36
Fenomeno Svislando, La 30
Fonto 197
Granda galerio zamenhofa 2 12
Hirosima-Nagasaki. . . 2
Hungaraj fabeloj 54
Impotenta krestomatio 112
Impulso 14
Japana variacio 12
Jarlibro 86
Kain kaj Abel 112
Kalva kantistino, La 211
Kara diablino 32
Karnavalo en Rio 193
Kiel diri. . . ? 191
Kontakto 92
Kumeŭaŭa. . . 132
Laŭ e. . . fika maniero 12
Laŭokazaj lingvaj notoj 129
Lazur' kristala kaj pluv' susura
170
Libro de romanoj 73
LPLP 94
Marfilo Karlo 210
Matenruĝo 171
Monato 26
Newsweek 122
Noktomeza kortumo, La 132
Participoj kaj konjugaciaj formoj
... 133
Piratoj de Penzanco, La 11
Plena verkaro de L.L. Zamenhof
201
Pluredroj kaj plurĉeloj 134
Poezia bukedo por geknaboj de
la mondo 11
Pri Esperanta tradukarto 13
Pri lingvo kaj aliaj artoj 51
Retoj 31
Rikardo tria 170
Riporto skribita en la pendumila
maŝo 171
Sarkasme kaj entuziasme 113
Sekso kaj egaleco 99
Skizo de sŭahila metriko 209
Slipara vortaro 111
Sonĝpoemo pri ponto 133
Transoceana 24
Veselin Damjanov kantas. . . 31
Vivendo 113
Elekto de komitatanoj B 21, 123
Entomotaksonomio 76
Esperantologio 30, 35, 46, 117
Estrara Raporto 1979/80 85-97,
152
Eŭropa E-Centro 90
Eŭropa Komunumo 90, 123
Evolulandoj 23, 26, 34, 41, 56, 83,
98, 121, 128, 161
Faka agado 45, 61, 94, 109, 208
Faka literaturo 17, 37
Financo 23, 86, 95-97, 118, 162,
176, 215
Finnlando 16, 17, 28, 167, 177
Finnugristiko 71

Francio 17, 76, 98, 108, 117, 167, 214
 Francis, J. 170
 Frank, H. 36, 208
 Fučík, J. 171
 Gabrielli, L. 57, 113
 Genevoix, M. 198
 Germana DR 16, 36, 98, 127
 Germanio, FR 34, 117, 138, 167, 177, 194
 Gilbert, W.S. 11
 Giorgi, A. De 10, 32, 73, 112
 Glazunov, V.A. 155, 187
 Golden, B. 71, 155, 214 (v. ankaŭ sub Ekzameno E)
 Gonin, R. 155
 Goodheir, A. 113, 132, 153
 Grafika Centro Antverpeno 86
 Greutert, K. 88
 Gruić, F. 210
 Győry Nagy, L. 137
 Ĝenerala Voĉdono 21
 Ĝivoje, M. 153
 Ĝorgieski, V. 137
 Harry, R. 139
 Haszpra, O. 99
 Haupenthal, R. 171
 Heck, A. 10
 Heinrich, P. 198
 Hess, J. 198
 Heugten, W.A.M. van 210
 Heyerdahl, T. 148
 Hill, D. 31
 Hinda Unio 83
 Hispanio 23, 138, 213
 Historio 101
 Holzhaus, A. 12
 Homaj rajtoj 17
 Honoraj membroj 85, 151
 Honora Patrona Komitato 151
 Hromada, R. 171
 Hueter, C. 151

Hungario 23, 35, 37, 45, 56, 98, 115
 IFEF 76, 109, 197, 214
 ILEI 110, 177
 Infankongreseto 48, 156
 Informado 16, 17, 35, 36, 43, 56, 57, 61, 76, 82, 88, 98, 99, 116, 122, 137, 182, 213
 Inoue, H. 43
 Instituto Hodler '68 87, 109
 Instruado 7, 56, 76, 110, 161
 Interlingvistiko 24, 98
 Internacia Somera Universitato 70, 153
 Ionesco, E. 211
 Irano 56, 161, 196
 Irlando 117, 213
 Isaev, M. 153
 Isiguro, T. 137
 Islando 144, 195
 Isobe, Y. 50
 Italio 17, 75, 76, 99, 167, 206
 Jackson, I. 34, 75, 158
 Jakubcová, M. 78
 Japanio 2, 14, 17, 43, 98, 116, 121, 173, 196, 208, 213
 Jense, K. 198
 Jermář, J. 153
 Jong, R. de 32, 209
 Jordan, D.K. 112
 Jugoslavio 7, 35, 81, 110, 185
 Jung, T. 74, 178
 Kalendaro de eventoj 49, 135, 175
 Kalocsay, K. 171
 Kamerunio 56
 Kanado 16, 30, 76, 137
 Kat, J.O. de 134
 Kawasaki, N. 178
 Kawulok, Z. 155
 Kehlet, E. 151
 Kehlet, T. 26
 Kekkonen, U.K. 178

Kempeneers, P. 78
 Kibernetiko 36, 138, 208
 Kindler, H. 197
 Klemola, I. 151
 Kníchal, O. 155
 Knoedt, L. 164, 191, 209
 Kökény, L. 151
 Koliševski, L. 82
 Kolker, B. 12, 113, 132, 171, 201, 213
 Kolombio 121, 177
 Komunikado 182
 Kongresoj:
 UK 63a, Varno 97
 UK 64a, Lucerno 88, 97
 UK 65a, Stokholmo 2, 15, 62, 70, 141-157, 160
 UK 66a, Brazilio 62, 122, 166, 174, 202
 IJK 35a, Austerlitz 92
 IJK 36a, Rauma 28, 158
 IJK 37a, Oaxtepec 115, 136, 173, 212
 Kongresoj aliaj:
 Blindula 163
 Fervojista 109
 Pacifika 30
 Tutamerika 30
 Koreo 76, 121, 173, 177, 212
 Korespondado 64
 Kotizoj 179
 Kozlevčar, J. 37
 Krikke, W. 171, 192, 209
 Krilov, I.A. 52
 Kubo 41, 56, 116, 196
 Kulturo 90, 167
 Kuroda, M. 155, 168, 170
 Kursoj 56, 98, 116, 161, 196
 Kusurakis, S. 137
 Lagrange, G. 211
 Landa agado 41, 42, 83, 93, 117, 126, 127
 Lange, O.C. 37
 Lapenna, E. 85
 Lentaigne, L. 191
 Le Puil, J. 53
 Lernolibroj 53, 213
 Leteroj de legantoj 8
 Libroj 65, 197
 Liempt, W.H.W. van 32
 Lindén, H. 155
 Lindstedt, J. kaj T. 28
 Lingva diskriminacio 148
 Lingvistiko 24, 46, 66, 71, 117
 Lingvo 24, 104, 128, 129
 Lingvo-politiko 108
 Lingvo-problemo 1, 71, 82, 106, 108, 127, 182
 Lins, U. 74
 Literaturo 77, 167, 168, 187, 214
 Lobin, G. 111
 Lorjak (pseŭd.) 31
 MacGill, S. 123, 152, 155, 212
 Maddern, I.T. 198
 Maertens, G. 90, 149, 151, 157



KUN BONDEZIROJ POR LA NOVA JARO...

KUN BONDEZIROJ OKAZE DE LA SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO...

Same kiel pasintjare (bedaŭrinde, eĉ kun la sama malfruo) UNICEF (Fonduso de Unuigintaj Nacioj por la Infanaro) publikigis por UEA serion de kvin bondeziraj kartoj kun plurkoloraj desegnaĵoj kaj la supraj tekstoj. UEA vendas la kartojn profite al UNICEF kaj do ne donas rabaton. Dek kartoj kun kovertoj (minimuma mendokvanto) kostas 11,00 gld. ĉe la Libro servo de UEA.

Maitzen, H.M. 10
 Manfred, J. 10
 Maris, J. 209
 Martinson, H. 68, 69
 Masterman, D. 11, 113, 155
 Matasin, J. 198
 Maul, S. 26
 M'Bow, A.-M. 197
 McAloon, J. 22, 89, 152
 Meksikio 115, 121, 136, 173
 Membro-statistiko 58, 86, 177
 Merriman, B. 132
 Mészáros, B. 153
 Metz, Z. 14
 Mijake, Š. 137
 Milojević, S. 41, 62, 65, 67, 81, 121, 148
 Miyamoto, M. 12, 113
 Moker, L. 37
 Mondcivitanoj 139
 Monkiewicz, B. 192
 Montano, T. (pseŭd.) 12
 Moritz, U.J. 4
 Movado 1, 41, 61, 83, 94, 121, 141-145, 148-151, 161
 Muller, R. 22
 Müller, T. 192
 Muziko 11, 31, 53, 214
 Nederlando 116, 138, 139
 Neergaard, P. 17, 151
 Nepalo 98
 Nervi, M. 51, 73, 154, 155, 170, 197, 211
 Nikaragvo 213
 Nikolić, D. 137
 Nikolov, N. 45
 Nikolov, Z. 142-160
 Nilsson, B. 69
 Nogueira, R.P. 203
 Norvegio 213
 Nov-Jorka Oficejo de UEA 22, 89, 125
 Novobilský, V. 17
 Nov-Zelando 213
 Oficiala informilo 18, 37, 57, 77, 100, 118, 139, 178, 198, 215
 Oka, K. 171
 Organizo de Amerikaj Ŝtatoj 90, 144
 Ornitologoj 197
 Orr, W.F. 134
 Orsolini, A. 77
 Pacista movado 214
 Pakistano 128
 Pals Kingma, I. 198
 Parlamenta agado 16, 45, 90, 99, 107, 123
 Patrinu, D. 51
 Peeraerts, P. 34, 152
 Periodaĵoj v. Eldonaĵoj
 Peruo 56
 Pettyn, A. 151
 Pilger, W.F. 11, 53, 63, 128, 133, 152, 192
 Piron, C. 82, 90, 106, 124, 177

Podmele, L. 155
 Pollando 126, 177, 196
 Pool, J. 139, 153
 Portugalio 98
 Poŝtmark-kolektado 86
 Pothuizen, C. 54
 Potts, Bertram 11
 Power, C.R.L. 12, 112, 133
 Premioj 57, 213
 Pupteatro 154, 186
 Radio 16, 36, 40, 63, 120, 177, 220
 Radioamatoroj 117
 Rados, P. 170, 192
 Ragnarsson, B. 73, 151, 153, 167
 Recenzoj v. Eldonaĵoj
 Régulo Pérez, J. 197
 Reiersøl, O. 133
 Rezolucioj 148
 Rossetti, R. 11, 104
 Rotarianoj 139
 Rublov, S.G. 52
 Ruĝa Kruco 214
 Rumanio 208
 Rzymkowski, A. 153
 Sadler, V. 150, 152, 162, 181
 Saheb-Zamani, Ĵ. A. 161
 Salt, B. 151
 Samodaj, V.V. 31, 52, 113, 134
 Sancho-Izquierdo, M. 99
 Santamaría Neira, J. 78
 Saussure, R. de 47
 Schinkel, J. 198
 Schoultz, I. 184
 Schulz, R. 53, 69, 99
 Schwartz, R. 167
 Scienco 71, 98, 138, 208
 Sekelj, T. 50, 132, 182, 206
 Semajno de Internacia Amikeco 6
 Setälä, E.N. 71
 Setälä, V. 17
 Shinoda, H. 85
 Silber, G. (pseŭd.) 192
 Skaljer-Race, V. 155
 Sly, S. 107
 Smet, W.M.A. de 6, 153
 Söderberg, K. 68
 Sonrevuo 77
 Soveta Unio 17, 35, 56, 76, 116, 213
 Starck, J. 210
 Statuto de UEA 21, 85
 Stein, O.A. 198
 Stevenson, R.L. 113
 Støp-Bowitz, C. 61, 64, 127, 151, 153
 Su, Armand 116
 Sud-Afriko 35
 Sullivan, A. 11
 Supersignoj 128, 182
 Sutton, G. 13
 Svedio 36, 67, 138, 141, 185
 Svislando 30, 55, 56, 99
 Szathmári, S. 112
 Šekspiro, V. 170
 Ŝimizu, K. 129, 191

Ŝparkontoj ĉe UEA 162
 Tago de la Tero 44
 Tarrant, I.D. 34
 Teatro 42, 117, 154
 TEJO 14, 34, 55, 75, 91, 115, 123, 136, 158, 173, 194, 208, 212
 Televido 56, 76, 116, 177
 Terminaroj 32
 Thorsteinsson, Th. 79
 Tichý, F. 198
 Tietti, S. 78
 Tingle, Ch. 198
 Tišljär, Z. 7
 Tito, Josip Broz 81, 82
 Todorov, P. 151
 Tófalvi, É. 155
 Toki, Z. 137
 Tonkin, H. 1, 23, 117, 142, 148, 153
 Tradukoj 10, 77, 167
 Turismo 77
 Turkio 17
 Tyblewski, T. 197
 Tyynelä, T. 155
 UEA:
 Estraro 62, 150
 Komitato 21, 150
 Ueyama, M. 12
 Umeda, J. 43
 Umesao, T. 151
 UN 1, 17, 22, 23, 26, 76, 89, 99, 125, 144
 Unesko 1, 34, 89, 182, 206
 Universitatoj 35, 37, 117, 137, 138, 196
 Usono 16, 22, 35, 117, 125, 138
 Valano, J. (pseŭd.) 134, 197
 Vegetaranoj 139
 Venezuelo 36, 196
 Venture, A. 129
 Verloren v. Themaat, W.A. 139
 Vessela, N. 209
 Vigger, B. 163
 Vilborg, E. 153
 Vinař, V. 155
 Virina agado 3, 26, 99, 186
 Volontula servo 85, 178
 Vortaroj 17, 177, 196
 Waldowski, W. von 78
 Wandel, A. 173
 Waringhien, G. 103
 Waseda, M. 186
 Watts, T. 111
 Weatherby, P. 158
 Weide, A. 53
 Weidmann, D. 55
 Wells, J.C. 5, 116, 145, 153
 Wilson, H. 57
 Wood, R.E. 16, 153
 Wüster, E. 47
 Ye Junjian 153
 Zairio 116
 Zamenhof, L.L. 148, 201
 Zborowska, B. 155
 Zee, S.J. 181

Himnoj serĉataj

Laŭ informo en la pasintmarta numero de ĉi tiu revuo, UEA havis anojn jam en 91 landoj! Kiu(j) el ili povus informi min, ĉu havas nacian himnon: Bermudo, Hongkongo, Mozambiko, Papua Nov-Gvineo? Se jes, bonvolu sendi en ĉiuj eblaj formoj! Sonforme (surdiske, se eble) mi serĉas la himnojn de Antiloj Nederlandaj (Kurasao), Kenjo, Kuvajto, Liberio, Malajzio, Malavio, Niĝerio, Pakistano, Portoriko, Singapuro, Srilanko kaj Zairio. Sur propralande eldonita disko mi klopodas akiri la himnon de (krom la jam menciitaj landoj): Afganio, Albanio, Alĝerio, Aŭstralio, Bangladeŝo, Ebura Bordo, Egiptio, Ganao, Hinda Unio, Indonezio, Irako, Irano, Islando, Israelo, Kamerunio, Luksemburgo, Malto, Maroko, Madagaskaro, Maŭricio, Monako, Mongolio, Panamo, Peruo, Senegalio, Sirio, Sud-Afriko, Sudano, Tunizio, Vatikano. Min interesas ĉiuj tri prezentoformoj: deklama, kanta kaj instrumenta. Ĉiujn eventualeajn donacojn, informojn, interŝanĝproponojn kaj prezofertojn — pri diskoj, aliaj sonkanelajoj, kasetoj, muziknotoj, tekstoj — bonvenigus la hungara kolektanto/fakdelegito: Georgo Csüllög, pf. 189, H-1502 Budapest, Hungario. Anticipan dankon kaj korajn salutojn!

ĈU VI JAM MALKOVRIS ĈI TIUN
UNIKAN PERIODAĴON EN LA
INTERNACIA LINGVO?

MONATO

internacia magazino sendependa

Eldonanto: Torben Kehlet / STAFETO

Ĉefredaktoro: Stefan MAUL

40 paĝoj DIN A4, riĉe ilustrita. Dek unu kajeroj jare. Jara abono: 49,50 gmk aŭ 800,- b.fr. La abonon bonvolu sendi rekte al la eldonejo: TK/STAFETO p.v.b.a., Miksebaan 65A, B-2130 Brasschaat, Belgio. Poŝtĉekkonto je la nomo de la eldonejo estas: 000-0422856-33.

Se vi ankoraŭ ne estas abonanto de "MONATO", petu provekzempleron kontraŭ du internaciaj respondkuponoj. (Vi tamen memoru, ke unu persono povas nur unufoje fari tian peton). Antaŭdankon!

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,80 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj mem, kiuj bonvolu memori, ke ni ne donas rabaton pro la ripetado de la anoncetoj.

Nacia kongreso de ELNA okazos en Nov-Jorko inter la 17a kaj 21a de julio 1981. Riĉa programo antaŭvidita. Eksterlandaj esperantistoj estas tre bonvenaj. Petu detalojn de ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono.

La plej — en la tuta mondo: *Esperanto laŭ la patrino metodo*, 320 paĝoj, DM 50,00. La kurso-konversacio nur en Esperanto. August Weide, Nordalbingergasse 65, D-2000 Hamburg 61, FR Germanio. Poŝtkonto: Hamburg 150 58-209.

28-jara fraŭlo deziras korespondi tutmonde pri ĉiuj temoj: José Carlos Barbosa, Travessa Jupira 34, BR-24110 Niterói, Brazilo.

Pri ceramikaĵoj deziras korespondi: Hortensio, Junhi-ĉe, Yeokchandong 32-37, Eunpyangku, Seoul, Koreujo.

Volas korespondi pri internacia pacdevigo John C. Lincoln, 3742 East Indian School — Suite 69, Phoenix, AZ 85018, Usono.

Naŭdek sep gestudentoj pri farmacio, komencantoj, volas korespondi pri farmacio, epidemologio, infektaj malsanoj, higieno ktp. Skribu al: d-ro D.N. Bogdanov, ul. Sverdlova 23-8, KMU-2, IONH, SU-252003 Kiev 3, Soveta Unio.

Mi volas interŝanĝi poŝtmarkojn el la tuta mondo, nombron kontraŭ nombro. M.J.E. Kat, Boliviadreef 88, 3563 GM Utrecht, Nederlando.


Francajn ludkartojn 'Florentine', 'Cancan', 'Casanova' de Philibert (plus loteribiletojn por amiko) deziras aĉeti/interŝanĝe akiri: Sune Ahlm, Nygatan 20A, S-462 00 Vänersborg, Svedio.

Demonstro per ekzemplo: "Rakonto pri admirinda sin-ofero". Prezo (afrankite): 10 francaj frankoj aŭ samvaloraĵo aŭ kvar poŝtkuponoj. Mendu ĉe: F-ino Germaine Kirtz, 5 boulevard Alliés, F-68100 Mulhouse, Francio. Poŝtkonto: 993.48 X F-67900 Strasbourg.

Deziras korespondi/renkontiĝi kun orientaj aktivistinoj 25-40j. Mi estas ano de la Mondregistaro de Mondcivitanoj. J. Dale, 1614 19th St. N. W., Washington, DC 20009, Usono.

Italaj plenaĝuloj, diversprofesiaj, kaj cent geknaboj 7-12-jaraj, deziras korespondi tutmonde. Bonvolu skribi mallonge, klare, prefere tajpe. Esperanto-Grupo, ĉe Maria Murgioni, Via G. Pepe 19, I-09100 Cagliari, Italujo.

Disko en Esperanto: impona kantato, popolkantoj, koruso, solkantistoj. Ĉiuj tekstoj sur la koverto. Tia estas la disko *Songpoemo pri ponto*, eldonita de Islanda Esperanto-Asocio. Prezo: 27,90 guldenoj. Havebla ĉe la Libroservo de UEA (kun triona rabato por samtempa mendo de minimume tri ekzempleroj).



Esperanto en radio

Ĉiujn informojn pri radio bv. sendi al s-ro G. Larglantier (redaktoro de ĉi tiu rubriko), 29, Bd. Murat, F-75016 Paris, Francio. En la tabelo, la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Pri aliaj horzonoj v. en la Jarlibro 1980, p. 90. Mallongigoj: I = informoj, P = parolado, K = kurso.

ĈIUTAGE

05.00-05.30 Varsovio, 200m (1503 kHz), 75.85m (3955 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz), 41.27m (7270 kHz). I.P. Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00950 Warszawa, Pollando.

11.00-11.30 Pekino, 31.78m (9440 kHz), 19.34m (15510 kHz). I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Popola Respubliko Ĉinio.

13.00-13.30 Pekino, 25.67m (11685 kHz), 19.81m (15145 kHz). I.

15.30-16.00 Varsovio, 48.90m (6135 kHz), 31.45m (9540 kHz). I.P.

20.00-20.30 Pekino, 40.16m (7470 kHz), 30.10m (9965 kHz). I.

21.30-22.00 Varsovio, 200m (1503 kHz), 75.85m (3955 kHz), 50.04m (5995 kHz), 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz). I.P.

22.30-23.00 Pekino, 32.00m (9365 kHz), 25.75m (11650 kHz). I.

DIMANĈE

05.45-05.55 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 19.66m (15260 kHz), 13.90m (21575 kHz). I.P. ORF, Esperanto, A-1136 Wien, Aŭstrio. Ripeto de la antaŭa sabata programo.

20.05-20.15 Vatikano, 196m (1530 kHz), 48.47m (6190 kHz), 41.38m (7250 kHz), 31.17m (9625 kHz), 31.10m (9645 kHz), 25.64m (11700 kHz), 19.84m (15120 kHz). I.P.

Radiovaticana, Esperanto-fako, Piazza Pia 3, I-00193 Roma, Italio.

20.00-20.20 Romo, 41.24m (7275 kHz), 41.15m (7290 kHz), 31.33m (9575 kHz). P. Radio Roma,

Esperanto-fako, Casella Postale 320, I-00100 Roma, Italio.

23.00-23.15 Rio de Janeiro, 214m

(1400 kHz). P. Brazilia Spiritisma Federacio, av. Passos 30, BR-20000 Rio de Janeiro ZC 58, Brazilo.

LUNDE

00.00-01.00 Sorocaba, 278m (1080 kHz). I.K. Rádio Clube de Sorocaba, Esperanto-redakcio, rua da Penha 455, BR-18100 Sorocaba (SP), Brazilo.

18.00-18.10 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66 (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz), P. Svisa Radio Internacia, Esperanto-fako, CH-3000 Bern 15, Svislando.

20.30-20.40 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66 (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz), 19.78m (15170 kHz), 16.89m (17760 kHz), 16.83m (17830 kHz). P.

MARDE

22.45-23.00 Zagrebo, 264m (1163 kHz). P. Radio Zagreb, Esperanto-fako, Zagreb, Jugoslavio.

MERKREDE

21.30-21.45 Sabadell, 187m (1602 kHz). I.K. Radio EAJ 20, Esperanto-fako, C. Convento 22, Sabadell, Hispanio.

ĴAŬDE

06.10-06.30 Vatikano, 196m (1530 kHz), 41.38m (7250 kHz), 31.17m (9625 kHz), 31.10m (9645 kHz), 25.61m (11715 kHz), 25.55m (11740 kHz), 19.84m (15120 kHz), kaj M.F. 93.0 MHz, 96.5 MHz. I.P.

17.50-17.55 Vieno, 89.8 MHz (mod. frekv.). I. ORF, Esperanto, Postfach 700, A-1041 Wien, Aŭstrio.

18.00-10.10 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

20.30-20.40 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

SABATE

16.45-16.55 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 30.71m (9770 kHz), 19.28m (15560 kHz). I.P.

18.00-18.10 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

20.30-20.40 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

20.30-20.45 Valencio, 358m (836 kHz). P. La Voz de Valencia, av. del Cid 154, Valencia 14, Hispanio.

ĜENERALA AŬDEBLECO

Ne estas eble certigi, ke iu elsendo estas aŭ ne estas kaptebla en difinita lando aŭ mondparto. Tro multe da daŭraj aŭ nedaŭraj cirkonstancoj influas la propagadon de ondoj: atmosfera stato, sezono, parto de la tago, geografia ĉirkaŭaĵo de la aŭskultanto, tipo de la ricevilo kaj de la eventuala anteno ktp. Jen tamen kelkaj ĝeneralaj indikoj.

a) Direktitaj ondoj. **Berno**: 15170, 17760 kaj 17830 kHz al Afriko. **Pekino**: 9440 kaj 15510 kHz al Japanio kaj Koreo; 11685 kaj 15145 kHz al Sudorienta Azio; 7470 kaj 9965 kHz al Eŭropo; 9365 kaj 11650 kHz al Centra kaj Suda Ameriko. **Vatikano**: 9625, 11700 kaj 15120 kHz al Afriko; 6190, 9645, 11740 kHz al Ameriko; 6190, 7250, 9625, 9645 kaj 11715 kHz al Eŭropo. **Vieno**: 6155, 9770 kHz al Eŭropo; 15260 kHz al Nordorienta Ameriko; 15560 kHz al Proksima Oriento; 21575 kHz al Aŭstralio kaj Azio.

b) Nedirektitaj ondoj kapteblaj longdistance: **Berno** (3985, 6165 kaj 9535 kHz), **Romo**, **Varsovio**, **Vatikano** (1530 kHz), **Zagrebo**.

c) Nur loka aŭskultebleco por **Rio de Janeiro**, **Sabadell**, **Sorocaba**, **Valencio** kaj ĉiuj disaŭdigoj per modulita frekvenco (M.F.).

Esperanto en radio: Ĉu vi legis la artikolon "Kiel argumenti por pliaj elsendoj?" en la aprila revunumero? Rigardu al tiu teksto kaj, se la dua cifero de via poŝtkodo, bankkonto aŭ pasporta numero estas 2, bonvenus, ke vi nun skribu pri Esperanto-elsendoj al kelkaj radio-stacioj. Ek!

Ne sufiĉas nur aŭskulti radio-programojn en Esperanto! Necessas foje skribi al la redakcioj. Radio-elsendoj ne havas abonantojn kaj eldonkvantojn por kalkuli. Viaj leteroj estas la sola signo pri la populareco kaj dezirindeco de tiu valora praktika utiligo de la Internacia Lingvo.

TINĈJO

La Krabo kun Oraj Pinciloj



Eldonisto

CASTERMAN k **ESPERANTIX**

Disvendado

APEROS en MARTO 1981. La bindita volumo aspektos kiel "Asteriks" sed estos manskribita kaj enhavos 16 pliajn paĝojn.

PREZO: 25 fr.fr.

ANTAŬMENDOJ de minimume KVAR ekz. daŭre akceptataj. RABATOJ: 33% ekde cent ekz., 25% por malpli grandaj kvantoj; EKSPEDOKOSTOJ SENPAGAJ!

PAGOJ — per poŝtĉekkonto aŭ internacia poŝtmandato (Pĉk. ESPERANTIX Paris 2007.47 J), per franca bankĉeko aŭ eksterlanda Eŭroĉeko en francaj frankoj. Se tiuj pagmanieroj ne eblas, sendu bankĉekon de via lando, sed bonvolu aldoni 10% por bankkosto.

GRAVA ATENTIGO: Pagu antaŭ 1981 02 28, ĉar poste la SOLA rabato estos de 25% por minimume DEK ekzempleroj.

DANKON!



POŝTADRESO:

ESPERANTIX

LIBRE-RÉPONSE 8538-75S

F-75742 PARIS CEDEX 15

FR-FRANCIO

Mendu tiuj!

TELEGRAMOJ:

ESPERANTO PARIS

TELEKSO: 250 303 PUBLI PARIS ESPERANTO



Kopirajto © 1980, CASTERMAN

Savu nin

per starigo de la
SUPERDEMOKRATA MONDORGANIZO!

♦ Esp/40

Ĉiu pliperfektigo de la homa vivo devenis de unusola menso, kiu vidis en iu direkto, panorame, pli larĝe ol la amaso de la majstroj samfakaj. La amaso de la laikaj mensoj, inkluzive pintajn spertulojn alifakajn, sentis ĉiufoje la devon kontraŭbatali la novan herezon de iu Koperniko, Galileo ks., kiun ne komprenis la amaso de alifakaj mensoj. **KONKLUDO:** Tiu, kiu serĉas la direktivojn de la amaso, anstataŭ tiujn de la pintaj fakuloj, malutilas kaj al si mem kaj al siaj proksimuloj. Tiu ago fakte enhavas negativajn sekvojn, nepre plorendajn, pro la leĝo de karmo: ke ĉiu ago havas proprajn apartajn konsekvencojn.


♦ Esp/41

La spaco sur la stratoj estas limigita, dum la postuloj de la stratuzantoj estas senlimaj. Sen kodo, sen punpagoj ks., ĉiu el ili postulus la tutan straton por si mem. Sen regularo, devige altrudita, por la komuna uzo, la senbridaj uzantoj post unu horo blokus la trafikon eĉ kontraŭintence. La kodon trudas, do, la cirkonstancoj. Simile estas por la kunposedaĵo domo,

kiel ankaŭ por la kunposedaĵo Tero. Urĝe necesas lerni kunvivi organizite, etike, ankaŭ en la politiko. Jen la ŝlosilo por travivi ankoraŭ en la tria jarmilo!

♦ Esp/42


Jam akceptataj estas abonoj al la kvarmonata revuo **LA POLITIKA KLIENTO**, organo de la tutmonda Ligo de la Politikaj Klientoj maldormigitaj: rigardado perioda, per superdemokrataj okuloj, de la monda problemaro; voĉo de la klientoj; etika kodo de la kunposedaĵo Tero. Jarabono: 10,— usonaj dolaroj por nur la Esperanta eldono; duoble por la Esperanta/franca, la Esperanta/angla aŭ la Esperanta/hispana. Sendu la monon al nederlanda pĉk 37 89 64 Den Haag (UEA) por M/I konto 5647. Informon pri la pago kaj tajpitan adreson sendu al la ĉi-suba adreso de **MONDHARMONIIGA INSTITUTO**.



MONDHARMONIIGA INSTITUTO
VIA SPORT 18, I-40065 PIANORO, ITALIO

Ekkonu la heroan laboron de niaj pioniroj per tiu ĉi informriĉa kaj bela libro!

604p., 24cm., plaste bindita. Prezo: 45,— gld. Mendu ĉe UEA aŭ rekte ĉe Hungara Esperanto-Asocio!



Libroj de la nova eldonejo

La Kritikanto

ekscitos interesigon pri nia kulturo kaj literaturo. . .

Miyamoto m.; *Sarkasme kaj entuziasme*

Ĉu esperanto estas vere internacia lingvo? Ĉu la recenzo estas nepre necesa? La ebleco de internacia literaturo en esperanto. K.m.a.

18,— gld.

Benczik v.; *Studoj pri la esperanta literaturo*

Teoriaj problemoj de la esperanta literaturo. La proza stilo en esperanto. Studoj pri Baghy, Emba, Szilágyi, Auld, la skota skolo, Szathmári, Sadler k.a.

19,50 gld.

Miyamoto m.; *Skiza historio de la utao*

Utao: japana klasika poezio, kaj unu el la multkoloraj facetoj de la japana kulturo.

12,— gld.

Mendu ĉe la Libroservo de UEA. Revendistoj skribu al la eldonisto: s-ro MINE Yositaka, Kitahama-Kitawaki 29-16, TAKASAGO, 671-01 Japanio.

SUK-81

05 - 19 julio 1981
en LIEGE (Belgio)

EKOLOGIO—PEDAGOGIO

Informas: Someraj Universitataj Kursoj
BP 9, B - Liège X, Belgio

Baldaŭ realaĵo kaj raraĵo

Jam aperis naŭ volumoj (1 ĝis 8, plus 1bis) en la versajne plej granda unuopa eldonprojekto en la historio de la Internacia Lingvo:

iam kompletigota plena verkaro de zamenhof

Spite la grandecon de la laboro, la kvalito de ĉi tiu eldonserio instigis prof. G. Waringhien skribi jenon: "Krom la originalaj eldonoj. . . la baza, plej fidinda kaj enhavriĉa eldono estas tiu de Ludovikito. . ."

1. unuaj libroj por esperantistoj (1887-1888), 156p. 36 gld.
- 1bis la inkunabloj de esperanto (1887-1889), 283p. 36 gld.
2. ni laboru kaj esperu! (1887-1891), 324p. 36 gld.
3. antaŭen al la laboro! (1892-1895), 344p. 36 gld.
4. tamen la afero progresas! (1896-1900), 414p. 36 gld.
5. hebreo el la geto (1859-1901), 455p. 36 gld.
6. kun gradaj paŝoj eksterlanden! (1901-1904), 427p. 36 gld.
7. klopodis organizi, sed vane! (1905-1906), 443p. 39 gld.
8. por kaj kontraŭ reformoj! (1907-1908), 383p. 39 gld.

Ankoraŭ aperontaj estas: *mortinta, sed senmorta!* (1909-1917), *postrikolto de ludovikaĵoj kaj* — kvarvoluma kolekto de la zamenhofaj tradukaĵoj.

Se vi atendas la aperon de la du lastaj volumoj, vi riskas la elĉerpiĝon de la jam eldonitaj. La eldonkvanto estas nur 999 ekz. **MENDU TUI ĈE LA LIBROSERVOJ DE UEA. JEI, KLEG!**

